




1 \* 89 · 130 ·

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO · ASOCIO





## ...el Pollando

Studentino deziras korespondi kun **ĉeĥaj esperantistoj**: Beata Kostrzewska Straszewo, 87-708 Straszewo, woj. Włocławskie, Pollando.

36-jara instruistino interesigas pri turismo, fotografio, muziko, geografio kaj naturo: Cecylia Rybak, Żukczyn, 83-031 Łęnowo, woj. Gdańskie, Pollando.

17-jara lernantino de teknikumo, fraŭlino, volas korespondi kun **ĉeĥoslovakoj**: Gabriela Rogowska, Węgrzce Wielkie 295, 32-002 Pollando.

Volas korespondi kun personoj de 18 ĝis 40 jaroj el la tuta mondo pri vojagoj, turismo, filmo, teatro, muziko junula, Problemaro moderna junula. Adreso: Mariusz Zonik, str. Siedlecka 16/24 m 80 Varsovio, Pollando.

23-jara polo loganta en Wolin sur insulo Wolin deziras korespondi: Janusz Wolinski ul. Świerczewskiego 18/4, 72-500 Wolin, woj. szczecińskie, Pollando.

Intersangi postmarkojn novajn kaj malnovajn volas: M. Ostrowski, Skrytka 720, 42 218 Czestochowa 18, Pollando.

22-jara studentino interesigas pri turismo kaj literaturo: Małgorzata Baranowska str. Armii Czerwonej 18 m 25, 95-200 Pabianice, Pollando.

29-jara instruistino interesigas pri sporto kaj turismo: Jadwiga Jasionczak, str. I armii WP 6, 22-175 Dorohusk, Poll.

22-jara studentino interesigas pri turismo, matematiko, skoltismo, kolektas bildkartojn kaj mapojn: Barbara Perzowicz, str. Budowlana 4 m 14, 05-300 Minsk Mazowiecki, Polujo.

36-jara fervojisto deziras korespondi kun **ĉeĥoj**, interesigas pri filmo, muziko, libroj, intelektoamuzo, kolektas bildkartojn: Jan Lisowski, 64-200 Wolsztyn, ul. Armii Czerwonej 7, Poll.

39-jara fraŭlo deziras korespondi kun la tuta mondo pri teatro kaj filmo: Jan Piotr Sip, ul. Dzienynstiego 4c/1, Pl - 63-101 Srem, Pollando.

25-jara instruistino interesigas pri psikologio, literaturo kaj turismo, volas korespondi kun **ĉeĥoj kaj ĉeĥinoj**: Dorota Mroćek, ul. Międzyrzecka 58/92, 21-400 Łuków, Pollando.

30-jara oficistino interesigas pri literaturo, muziko, E-movado kaj turismo, ŝia hobia estas: kolektado de libroj kaj sondiskoj, legado de bonaj libroj, korespondado en E.,: Elż bieta Kambłowska ul. Aleksandrowska 16 m 56, 91-120 Łódź Pollando.

28-jaran polinon interesas historio mezepoka, vojagoj, kolektas postmarkojn, modelojn pri brodaĵoj: Teresa Kubiak, 44-335 Jastrzębie Zdrój, ul. Ruchu Oporu 45/2, woj. Katowickie, Pollando.

30-jara laboristo, adepto de naturismo volas korespondi kun **naturistoj/nudistoj**: Gregorz Wisnć, 62-005 Owinska, ul. Poprzeczna 14 c/13, Pollando.

25-jara studento interesigas pri turismo kaj sporto: Janusz Cepcer, 34-120 Andrychów, ul. Metalowców 1/39, Pollando

28-jara oficistino deziras korespondi: Janina Józwiak, 99-335 Witonia, woj. Płock Pollando.

25-jara polo interesigas pri junula muziko, sporto kaj ekstremorienta kulturo, pere de korespondado li volas konatigi kun **ĉeĥa e-istino**: Piotr Tombarkiewicz, ul. Spółdzielcza 7/86, 25-345 Kielce, Pollando.

18-jara lernanto de mezlernejo, estonta instruisto, interesigas pri turismo, muziko, literaturo kaj fotoarto, kolektas postmarkojn, bildkartojn kaj librojn: Sławomir Pasternak, Łasków 90, PL-28-300 Jędrzejów 1, woj. Kielce, Poll.

---

# NOVJARA mesaĝo

## de la prezidanto de ĈEA

---

Karaj membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, estimata legataro de Starto.

Jam duan fojon mi turnas min al vi okaze de la nova jaro. Kaj unu jaro jam estas sufiĉe longa periodo, eĉ la tuta kvinono de la funkcioperiodo. Tial antaŭ rigardo en la jaron 1989 ni turnu nin ankoraŭfoje al la jaro ĵus pasinta. Ĝi estis jaro por nia asocio certe sukcesa, ĉar ĝi starigis bonan bazon por plua evoluo de Esperanto en nia lando.

Unue, la membraro post multaj jaroj unuafoje rimarkinde kreskis. Nur ĝis septembro aligis sin 919 novaj membroj. Krom tio nia asocio altigis la nombron de aligitaj membroj de UEA el 1280 al 2100! La nombro de individuaj membroj de UEA el niaj vicoj ankaŭ kontentige kreskis.

Krome, la rilatoj al UEA rimarkinde plibonigis. Dum 73-a UK en Roterdamo post multaj jaroj ĈEA aktive kontribuis al la programo: d-rino V. Barandovská prezentis prelegon "Internacilingva verko de Komenio en spegulo de la 17-a jarcento" enkadre de Internacia Kongresa Universitato kaj niaj operkantistoj J. Vích kaj M. Smyčka ne nur kontribuis al la Internacia Vespero, sed krom tio havis memstaran preskaŭ duhoran koncerton. Apud konataj arioj el famaj ĉeĥaj operoj ili prezentis ankaŭ kaj moraviajn, kaj slovakajn popolkantojn. Kaj pluaj 24 personoj partoprenis la kongreson kiel turistoj per ekskurso organizita helpe de la vojaĝoficejo Ĉedok.

Kvankam nia asocio ĝis nun ne sukcesis akiri konvenajn ejojn por la biblioteko kaj libroservo, la libroservo jam tamen komencis funkcii. Ĝi tuj post sia fondigo ekplenumis sian ĉefan taskon prizorgi la esperantan literaturon eldonatan tra la mondo por membroj de ĈEA kaj samtempe pli efike diskonigadi niajn eldonaĵojn en Esperantujo. Tiurilate la kontaktoj surbaze de sendeviza intersango de esperantaĵoj estas establita ĝis nun kun la libroservoj de UEA, HEA, Pader-

borna Centro kaj eldonejo Lorenzo el Brazilo. Pliaj kontaktoj estas serĉataj.

Kiam ekfunkcios la pruntoservo de la biblioteko kaj Faka Informa Centro por Interlingvistiko /FICIN/, dependas de la akiro de la ĉambroj. Skribante ĉi tiun artikolon /oktobro 1988/ mi jam antaŭvidas sukceson ankaŭ en tiu direkto, do post kiam vi povos legi ĝin espereble eĉ tiu problemo estos solvita.

Certe indas menciigi, ke ankaŭ turisma komisiono reekfunkciis, kvankam ĝi ĝis nun ne plenumas ĉiujn taskojn, kiujn ni al ĝi komisiis. Tamen nia asocio jam komencis danke al kelkaj unuopaj anoj de TK kunlabori kun Monda Turismo kaj eĉ aranĝis kelkajn turismajn intersangojn.

Post grandega ampleksa laboro finfine normaligiĝis kontaktoj de la estraro kaj sekretarieja stabo kun la membraro. Vi certe jam menciis, ke nia organo Starto aperas regule, ĉiuj funkciuloj ricevas sufiĉe ofte ĉeĥlingvan cirkuleron Informilo de ĈEA, la mendoj estas plenumataj senprokraste...

Tre bonajn spertojn ni havas kun "Tago de malfermaj porĉoj" ĉiumerkrede inter 16-a kaj 17.30 horo en la sekretariejo. Tiutempe ĉiu membro povas veni sciante, ke li parolos kun la prezidanto aŭ sekretario de ĈEA pri kiu ajn temo, ĉar ambau havas rezervitan tempon nur por li. Estas menciinde, ke ofte venadas multaj esperantistoj eĉ el malproksimaj lokoj kaj dum tiuj babiladoj jam formigis kelkaj tre utilaj ideoj.

La koncizan ekskurson en la pasintan jaron mi finu per la informo, ke jam bone progresas realigo de la ideo novkonstrui monumenton omage al d-ro L. L. Zamenhof en Františkovy Lázně. Por tiu celo jam ne nur formigis komisiono por novkonstruo, sed la afero jam estas aprobita fare de Urba Nacia Komitato en Františkovy Lázně, la konvena loko estas elektita kaj eĉ baza financa sumo por preparlaboroj estas ekkolektata.

Memkompreneble multaj aliaj aferoj el agado dum pasinta jaro estus menciindaj, tamen mi turnu la rigardon al la jaro 1989, kiun ni ĵus startas, do al niaj la plej proksimaj planoj.

Antaŭ ĉio ni devas kontinui la agadon, kiun ni sukcesplene komencis pasintjare. Do libroservo plivastigu intersangojn kaj serĉu novajn rimedojn por doni al niaj legantoj valoran legaĵon. Krome, ĉiujn fortojn ni donu al akiro de konvenaj ejoj. Ne por iu luksa oficejo, sed por nepre ekfunkcio de la biblioteko, FICIN kaj libroservo. Pluajn ĉambrojn ni bezonas por havi propran tranektejon kiel bazon al evoluo de turismo, kiun ni planas ĉefe surbaze de sendevizaj intersangoj.

Kiel novan fenomenon en ĉi tiu jaro ni enkondukas pluan altigon de la nivelo de niaj funkciuloj, precipe de tiuj, kiuj reprezentas la asocion eksterlande. Inter alie ĉiuj, antaŭ ol iri reprezenti nian asocion dum internaciaj aranĝoj, devos sukcesplene trairi la lingvan asocian ekzamenon, minimume la stupon "pri scio".

La planoj sur la tereno de eldona agado bedaŭrinde ĝis nun dependas de multaj flankoj neinflueblaj de ni mem. Pro tio mi ilin eĉ ne menciis, kvankam ni konsideras ilin tre gravaj.

Farante koncizan trarigardon de almenaŭ la plej gravaj eventoj dum venonta tempo, mi komencu per la festo omage al dudekjarigo de ĈEA en formo de malgranda enlanda universala kongreso. Do, laŭplane kontribuu al ĝi ĉu sekcioj aŭ komisionoj de ĈEA, ĉu rondetoj aŭ unuopaj membroj, por ke ĝi havu sufiĉe rican programon kaj fakan, kaj kulture amuzan. Memkompreneble ankaŭ internacia partopreno estas atendata.

Ankorau pli frue ol ĈEA tiun kongreseton la scienca-tek-nika sekcio kunlabore kun fervojista sekcio aranĝos internacian konferencon SAEST 89 jam komence de julio. Omage al 150-jara daŭro de la fervojo sur la teritorio de la nuntempa Ĉeĥoslovakio ĝi havos la temon "Trafiko" kaj estos kunmetita kun oficialaj festotagoj de la centkvindekjarigo de la fervojo.

La plej granda aranĝo en la jaro 1990 devus esti la 13-a kongreso de MEM, aranĝota omage al 650-jarigo de Pardubice en tiu urbo, kiu estas jam plurjare konata per sia es-

perantista pacdefenda agado. Oni kalkulas kun ĉeesto de proksimume 500 partoprenontoj.

Por la jaro 1991 jam estas decidite, ke en nia lando ni povos aranĝi kunlabore kun Ĉedok la 33-an IFEF-kongreson, dum kiu oni antaŭvidas partoprenon de 900 ĝis 1000 esperantistoj -fervojistoj. Jen grandega tasko por niaj fervojista sekcio kaj turisma komisiono.

Tamen, la ĵus nomita grandskala arango devus esti fakte "nur" antaŭpremiero por multoble pli signifa evento en nia esperanta vivo, nome la 77-a Universala Kongreso de Esperanto, por kiu ni proponis al estraro de UEA Pragon. Ne hazarde la jaro 1992 estas elektita; ni emas tiamaniere kontribui al la festo de 400-jariĝo de J. A. Komenio, ĉeĥa prapatro de interlingvistiko.

Dum tiu grandioza arango la inaŭguro de la novkonstruita monumento omage al d-ro Zamenhof estas planata, do de la monumento, kiun oni inaŭguris la 11-an de junio 1914 kiel la unuan en la mondo kaj kiun poste en 1938 detruis la nazioj.

Pri la loko de 77-a UK ankoraŭ ne estas decidite. Sed ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj, esperu, ke la estraro de UEA uzos la proponatan eblon kongresi dum la "Jaro de Komenio" en ĉefurbo de lia patrujo kaj krome dum tiu evento nove inaŭguri la unuan monumenton de d-ro Zamenhof en la mondo.

Fine de ĉi tiu mia novjara artikoleto mi simple deziras al vi, karaj legantoj, dum la tuta jaro 1989 firman sanon, plenumon de ĉiuj viaj deziroj kaj nelastfoje grandan laboremon sur la kampo de Esperanto. Ĉar fakte la menciitaj planoj ne realigus sen vi kaj sen via afabla helpemo kaj vigla laboro.

Amike kaj samideane

via Petro Chrdle



Sur la kovrilo:

" Ni volas pacon por ĉiuj infanoj el la tuta mondo! "

Desegnaĵo de Mirka Tomečková el České Budějovice.

# FERVOJISTA SEKCIO

## INTER MARO KAJ MONTARO

Neniu sufiĉe granda urbo en Francio povas pretendi, ke ĝi estas akceptema por ĉiuj gastoj senescepte: turistoj, industriistoj aŭ kongresanoj. En Perpignan, la realeco estas sufiĉe bela kaj evidenta por ke ne utilu maŝki ĝin: je 20 minuta veturado survoje troviĝas plurkilometraj plaĝoj el fajna sablo, kun rokaj ŝirmejoj. Tie evidentiĝas banstacioj, fis- kaj komerchavenoj plej koloraj. Trans profundaĵ valoj- varmaj lokoj tre privilegiaj kaj multthomaj - aperas kelkaj plej belaj montpintoj, el la plej belaj, kiuj donas al Perpignan harmonian fonon ĉar ili estas tre proksimaj.

Perpignan, tiel bone ekipita por urbanismo kaj libertempoj aŭ por ekonomio kaj kulturo, estas ĉe la centro de ĉiuj vojoj, kiuj kondukas al malkovro de la maro, de la montaro, kaj ankaŭ al la malkovro de granda kaj kultura komplekso el preĝejoj, abatejoj, citadeloj, artaj trezoroj, produktitaĵoj fare de dekjarcenta historio.

Perpignan fariĝis ankaŭ bone elektita loko de la jubilea 40-a IFEF-kongreso, kiu ĉi tie okazis la 4-an ĝis 11-an de junio 1988. Al la kongreso aligis 553 partoprenantoj el 19 landoj.

Grupeto de la ĉeĥoslovakaj partoprenantoj alveturis al Perpignan per nokta rapidtrajno post tuttaga restado en Parizo kaj vizito de ĝiaj elstaraj vidindaĵoj. Post kora akcepto fare de LKKanoj en la moderne trakonstruita stacidomo de Perpignan, pri kiu la mondfama pentristo Salvador DALI proklamis, ke ĝi estas "centro de la universo", ni estis transportitaj per autobuso al kongresejo. Nia kongresejo estis la urba "Palaco de la kongreso", bela moderna tutaĵo perfekte ekipita por akcepti ĉiuspecan multthoman renkontiĝon. Ĝi disponigis por IFEF-kongreso vastan halon por ekspozicioj, multnombrajn kunvenĉambrojn, auditorion kaj kafeterion. Krom la bankejo, internacia balo kaj ekskursoj okazis tie ĉi ĉiuj arangoj de la kongreso. Post akcepto kaj arango de la pagoj ni estis transportitaj al loĝadlokoj. Nia grupeto loĝis kun bulgaroj, jugoslavoj kaj iuj hispanoj en malmultekosta, tamen sufiĉe komforta junulargastejo ne tre malproksima de la kongresejo.

Vespere ekde la 19-a, post kelkhora refreŝiga ripozo, kolektiĝis la gekongresanoj en la kafeterio por la interkona vespero. Kiel kutime ĝi vekis varman ĝojan etoson. Eĉ tiuj samideanoj, kiuj la unuan fojon partoprenis en internacia kongreso, baldaŭ interamiĝis. Regis brua kaj gojplena atmosfero ĝis la malfrua disigo.

Dimanĉe matene, ekde la 9-a ni komencis plenigi la vastan auditorion, kie okazis la solena inaugura ceremonio. Agrable muzikis la vigla kataluna muzik-societo "Les Gais Troubadours" /la Gajaj Trobadoroj/. La inauguron ceestis krom kongresanoj multaj honoraj gastoj, inter ili s-ro Evrard, Regiona Direktoro de Montpellier, nome de SNCF, s-ro Truel, ĝenerala prezidanto de UAICF, s-ro Schmit,

ĝenerala prezidanto de FISAIC, Jean Mevel, nome de la Franca Komitato de Fervoja Entrepreno, s-ro Triolle, nome de UEA kaj aliaj. Post diversaj salutadoj /ankau la reprezentantoj de la landaj asocioj/ la IFEF-prezidanto Joachim Giessner en sia inaŭgura parolado akcentis la ideon, ke nia lingvo estu por ni ne nur simpla, interkompreniga helpo, sed vere la faka lingvo de la fervojistoj. Li substrekis la utilon de fakaj arangoj, de longa vico da fakprelegoj. Fine de sia parolado, li aludis pri la teruraj minacoj ŝvebantaj super la homaro kaj konkludis, ke ankau ni - esperantistoj - devas kontribui en la savo de la venontaj generacioj.

Post la solena malfermo okazis komuna fotado antaŭ la kongresparko.

Dum aliaj kongresaj arangoj la kongresanoj povis partopreni diversajn fakprelegojn, ekzemple la ĉefprelegon pri "TGV Atlantika", estis informataj de la Terminara Komisiono, ke estis finpretigita "Suplemento al Lexique General des termes ferroviaires de UIC" kiu entenas 10 204 terminojn inkludotaj en la venonta leksikono de UIC.

Dum ĝenerala kunveno oni elektis kiel nova vicprezidanto IFEF inĝ. István Gulyás el Hungario kaj la IFEF-familio plimultiĝis je du novaj landaj asocioj, tiujn de GDR kaj Ĉinio.

Dum folkloro vespero ni vidis belan spektaklon proponita fare de grupo da dancistoj bele kostumitaj de folkloraj vestoj, kiuj prezentis variajn tipajn dancojn el Rusiljono, Kataluno kaj Cerdanjo.

Dum Internacia balo marde vespere ni en la belega kadro de la kapelo Sankta Dominiko kaj dum muzikado de la orkestro AMACC /Muzika kaj Arta Kataluna Fervojista Asocio/ vigle dancis ĝis malfruj horoj.

Sed kun internaciaj kongresoj IFEF estas jam nedisigeble kunligitaj ankaŭ ekskursoj, ĉu fakaj, ĉu tiuj por interkonatigi la partoprenantojn kun vidindaĵoj de la kongresaj urbo kaj regiono.

Dum la faka ekskurso ni per aŭtobusoj vizitis la novan varstacion Perpignan-Roussillon. Tiu nova stacio estas konstruita ĉe la plena centro de areo nomita Saint-Charles, ĉe la tuja proksimo de la "internacia merkato". La speciala trafiko por "fruktoj kaj legomoj" apartigas 50 % de la tuta enstacia trafiko, kiu konstante evoluas kaj transprenas iom post iom la bazaktivecojn de la malnova stacio. Ni interkonatigis ankaŭ kun la nova terminalo, plenumanta ciam pli evoluantan transporton de konteneroj kaj survoĵaj kestoj /en 1987 320 000 tunoj/.

Dum gvidata vizito al la urbo Perpignan dimanĉe posttagmeze ni vizitis la ĉefajn vidindaĵojn de la kongresa urbo. Unue ni veturis al "Fondaĵo San Vicens", kiu iam estis kampodomo nun transformita en ian muzeon pri Artoj. Poste akceptis nin la "Palaco de la Regoj de Majorko", la plej grava monumento en Perpignan.

Bela suna vetero agrabligis ankaŭ niĝan unuan duontagan ekskurson, dum kiu ni lunde posttagmeze per 6 aŭtobusoj veturis tra belaj pejzaĝoj de la "Vermiljona marbordo", etendiganta inter blua maro kaj la montaro "Albères", kiun superstaras la pinto "Canigou" ankoraŭ iom neĝkovrita. Post veturado tra kelkaj urbetoj /Canet, St-Cyprien, Argelés/ ni havis unuhoran halton en Collioure por viziti tiun pen-



trindan haveneton. Poste ni daŭrigis pli suden ĝis Port-Vendres kaj Banyuls ĉe Maro, kie ni havis duan halton por viziti vinkelon kaj gustumi la tiean naturan dolĉan vinon. Kelkaj eĉ provis bani en la iomete varmeta akvo de la Mediteranea Maro.

Dum tuta ekskurso merkrede ni veturis per aŭtobusoj tra la masivo Corbieres - ĝi ligas Pireneojn kun Cevenoj - ĝis la abatejo Fonfroide, kiun ni vizitis. Post bonega tagmango en la kastelo Gausan, mezepoka loĝejo de la provinco Langvedoko, ni daŭrigis la ekskurson ĝis la vilago Tautavel, kaj vizitis ĝian Muzeon entenanantan multnombrajn prifosajajn objektojn.

Vendrede posttagmeze, dua duontaga ekskurso ebligis al ni malkovri la regionon Conflent kaj la urbon Villefranche kun ĝiaj fortikaĵoj.

Indas menciigi ankaŭ aktualizaĵojn el diversaj landoj kaj de Rafael Devis projekciatan filmon pri la venonta 41-a IFEF-kongreso en Salou /sude de Tarragona en Hispanio/.

Multaj kongresanoj profitis kelkajn ripozplenajn tagojn, vizitante post la kongreso de la 11-a ĝis la 14-a de junio la belegan Andoron, kiu situas sine de la montaro Pireneoj. Loĝante en tre komforta hotelo en Andorra la Vella, oni matene libere promenis aŭ ripozis, posttagmeze oni ekskursis al la "Tri Valoj" kaj al hispana vilaĝeto atingebla nur tra Andoro. Vespere oni ĝuis tipajn spektaklojn kun dancoj, interkonatiĝante kun kulturo de tiu ĉi malgranda lando, kie la impostoj estas ne konata afero kaj kie sekve oni povis ĉion aĉeti je favoraj prezoj.

Kun neforgeseblaj rememoroj la kongresanoj adiaŭis la sudan Francion kaj multajn malnovajn kaj novajn geamikojn, multaj kun forta decido ŝpari por partopreni ankaŭ la venontan IFEF-kongreson en Salou, kiu okazos en tagoj 13-a ĝis 19-a de majo 1989 kaj kie oni ekskursos al la fama vin-regiono Priorat, vizitos delton de la rivero Ebro, la antikvan urbon Taragonon kaj post la kongreso oni povos partopreni ekskurson al Majorko, la plej granda insulo de Balearoj en la Mediteranea maro.

Do ŝparu jam nun, por ke ankaŭ vi povu partopreni tiun ĉi allogan IFEF-kongreson.

Jindřich Tomíšek

1. Grupeto de la ĉeĥoslovakaj partoprenantoj en Parizo antaŭ vizito de la mondfama Montmartre
2. Monumento de la Venko sur la Placo de Gaulle estis riparata, tamen ĝi estis vizitata fare de multaj turistoj
3. Parto de la kongresanoj dum komuna fotado antaŭ la kongresparko
4. La mezepoka fortikaĵo en Collioure, unu el la multaj fortikaĵoj mezepoke sirmantaj la loĝantojn kontraŭ atakoj de marpiratoj
5. Antaŭ la mezepoka kastelo Gausan atendis nin ne nur algeriaj knabinoj, sed post refresiga vintrinkado (miksita kun kompoto) ankaŭ bongusta tagmango
6. Parto de la kongresanoj antaŭ la abatejo Fonfroide



# ESPERANTISTA KULTURA FESTIVALO

Jam la sesan fojon alveturis en Opava en la tagoj de la 16-a ĝis la 18-a de septembro esperantistoj el tuta respubliko kaj ankaŭ el Hungario, Bulgario kaj GDR por spekti programojn kaj ĝui amikan etoson de la VI-a Esperantista Kultura Festivalo. Sub auspicio de ĈEA kaj en la kadro de la 31-a Kultura Bezruč-semajno organizis ĝin membroj de la Esperantorondeto de Uzina klubo Ostroj Opava.

Dum la oficiala malfermo salutis la alveturintojn i.a. ankaŭ reprezentanto de la urbo - vicprezidanto de la Urba Nacia Komitato ing. Št. Krpec. La tuta festivala programo enhavis seminarion "Nacia kulturo kaj la Internacia Lingvo" kun interesaj paroladoj (J. Cink, V. Barandovská, A. Stanura, V. Kočvara), kiuj skizis sukcesojn de Esperanto en diversaj kulturaj laborkampoj, plue artan vesperon, ekskurson en ĉirkaŭaĵon de la urbo, teatraĵon kaj ankaŭ amikan dancvesperon. El la allogaj programeroj aparte menciinda estas "Strasisou" - prezentado de Teatro en Kofro el Košice. La ĉefrolinto T. Plaszky ludis - krom por esperantistoj - ankaŭ slovake por la loka publiko, kio bone kontribuis al akordigo de Esperanta kaj nacilingva programoj de la konata kultura semajno, kiu ĉiujare alrememorigas verkon de P. Bezruč. Longan aplaudon elvokis ankaŭ koncerto de la kanthoro Stěbořice, kiu kantis Esperante kaj ankaŭ en kelkaj aliaj lingvoj.

La altnivelan programon kaj glatan organizon laŭdis ne nur centoj da ceestintoj, sed alte prezis ilin ankaŭ gvidfunkciuloj de la urbo Opava.

kov



El la solena lokoturo de la 17-a Esperantista Kultura Festivalo en Ojwasj parolas V. Kofreva, spudo estas M. Rybin, Mung-Id kaj Ing. Si. Kpac, vicprezidento de la UKE Ojvas.

En la kultura programo partoprenis ĉefe "Gibobica" kun Esperantistoj, ruse, german- kaj latinlingvaj bantoj.



Inter la okcidentaj partoprenantoj de la kultura programo setis ankaŭ Jilke Kalling kaj Dirk Buchholz el GDR.

Grandan reŝonon havis la prezentado "Etraviziou" de Teatro en Fofoe el Eobica. Janko Krasko - Jozio Pico - sur la foto de M. Piaszkova.

# Enlandaj aranĝoj

JuSeTuR '88

Inter 19-a kaj 22-a de majo 1988 okazigis la Esperanto-Junularo de la Praga Klubo jam la duan fojon Junularan Semajnfinan Turisman Renkontigon (JuSeTuR), ĉi-foje en pionirtendaro en Prago-Hostivař. Partoprenis ĝin pli ol 90 homoj, el inter kiuj pli ol du trionoj estis eksterlandanoj, venintaj el Hungario, GDR, Pollando, Bulgario kaj Jugoslavio.

La organizantoj klopodis prepari por la ĉeestantoj kiel eble riĉan kaj allogan programon. Vendrede ĉiuj promenis tra la urbo, vizitante ĝiajn plej konatajn vidindaĵojn (ekzemple Pragan kastelon, Malnovurban kaj Venceslaan placojn, ponton de Karlo, renovigitan Regan vojon k.t.p.).

Sabate la partoprenantoj ekskursis al la kastelo Konopiště. Ĉiuj piedmarŝis ĉirkaŭ 12-kilometran vojon tra pitoreska barbara pejzaĝo, laŭlonge de la rivero Sázava.

Ĉiuvespere okazis amuza programo aŭ ĉe fajro aŭ en klubejoj de la tendaro, kie oni povis kanti, danci, ludi tablotenison kaj nelastfoje prezentigi kiel nacieco dum t.n. naciaj duonhoroj. La ĉefan premion merite akiris gastoj el GDR, kiuj i.a. prezentis propran humuran teatraĵeton pri estigo de Esperanto en la Paradizo.

La partoprenkotizo (de ĵaŭdo ĝis dimanĉo 200,- Kčs) inkluzivis ĉion, de manĝado (trifoje tage) kaj logado en kabanoj ĝis plena prizorgo dum la ekskursoj.

Kvankam la vetero ne estis tro bona kaj afabla (vendrede ec forte pluvis), multaj esprimis siajn dankojn kaj kontentecon promesante partopreni ankau nunjare, ec pli amase!

Tial la organizantoj el Esperantista Klubo en Prago interkonsentis daŭrigi tiun ĉi renkontigon kaj en la nuna jaro, en majo, samloke, samamase kaj en similaj partoprenkondicioj kiel pasintjare, kredante, ke la partoprenantoj veturigos kun si denove belajn rememorojn pri Prago, Ĉeĥoslovakio kaj ĝiaj enloĝantoj.

Ing. Vladimír Dvořák

## 12-a Renkonto de Esperantistaj Ŝakludantoj en Poděbrady

La renkonto okazis de la 1-a ĝis la 3-a de julio 1988 en banloko Poděbrady. La ĉefa arango de la renkonto estis la tradicia rapidmova ŝakturniro. Belaj vitraj premioj rekompencis la venkintojn. Venkis kiel jam kelkfoje s-ano Karel Wágner. Plej juna ŝakludanto estis Wittek Zbijewski el Varsovio. Dimanĉo okazis "Sekreta ekskurso" kun serĉado de "trezoro". Dum bela suna vetero oni marsis laŭ trovitaj slipoj, kiuj kondukis onin al celo. Plej sukcesa serĉantino estis Mariola el Siedlce, Pollando. La trezoron trovis emerita esperantisto Oldřich Toman el Děčín, Ĉeĥoslovakio.

Krome estis rica kultura programo, i.a. projekciado de filmoj el Kanado kaj Japanio, ekspozicio de esperantaĵoj, dancvespero kun tombolo k.a. Kiel kutime oni pridonacis la plej agan partoprenanton (O. Toman), la plej junan (L. Zilkowski, Varsovio, 3-jara) kaj la plej malproskiman (F. Wisocka el Siedlce, Pollando); ĉiuj tri ricevis belan rememoraĵon el fama ĉeĥa kristalo. Oni subskribis pacan deklaron, en kiu la partoprenantoj instigis al ĝenerala malarmado, per kio povas ekesti la paco kaj amikeco inter la popoloj en la tuta mondo. La rezolucioj estis forsenditaj al UEA, al la Ĉs.Paca Konsilantaro kaj al CK de la Komunista partio de Ĉeĥoslovakio. Pri la renkonto raportis la distrikta gazeto Nymbursko kaj Informa bulteno de loka baneja direktoro. La partoprenantoj ricevis belaspektajn insignojn. (Ladislav Fiala)

### Pluaj sukcesoj de Esperanta filatelio movado en Ĉeĥoslovakio

Dum la tagoj 1988-08-26 - 09-04 okazis en nia ĉefurbo la Tutmonda ekspozicio de postmarkoj PRAGA 88.

Dank' al la altaj sukcesoj el la pli fruaj filateliaz ekspozicioj povis ĝin ankaŭ partopreni per sia eksponaĵo: "Ĉapitroj el historio de Esperanto" s-ano VlÁda VÁNA el Plzeň. Lia menciita eksponaĵo gajnis grandan argentan medalon. Gratulon!

La rezultojn de la sukcesa laboro de Esperanto sekcio ĉe AĈSF - Asocio de ĉeĥoslovakaj filatelistoj, kiun gvidis dum la jaroj 1969-1981 s-ano VlÁda HASALA (nun ĝin prezidas s-ano VlÁda VÁNA) portas ankaŭ hodiaŭ. Ekzemple: la 1-an de julio 1988 aperigis la Ĉeĥoslovaka federala ministerio de telekomunikoj kaj trafiko porokazan, duekempleran serion de postmarkblokoj por propagandi la Tutmondan ekspozicion de postmarkoj PRAGA 88, okazinta en nia ĉefurbo. Sur unu el tiuj postmarkblokoj oni uzis duoble esperantlingvan tekston: TUTMONDA EKSPOZICIO DE POŠTMARKOJ. Do, plus rekonu por Esperanto de plej alta poŝta instanco en Ĉeĥoslovakio. -vlh-

El letero de nia leganto: La poŝto eldonis i.a. markofolion, inter kies kvar markoj estas du dukronaj kaj sur ilia kupono estas trilingva teksto, el la lingvoj la dua estas Esperanto: "Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj". La markofolio kostas 6 Kĉs, sed devige kun alia, neesperanta markofolio (9 Kĉs) sume 15 Kĉs. - Nia poŝto ne plenumis sian (skriban) promeson eldoni postmarkon kun esperantlingva teksto. ja.

### La Kolektanta fako de ĈEA denove eklaboros

Laŭ decido el la 8-a kunsido de prezidantaro de CK de ĈEA, el la 18.06.1988, la Kolektanta fako de ĈEA, kunlabore kun loka E-klubo en Strážnice, distr. Hodonín, kunvokas kunsidon-kunvenon de E-kolektantoj en urbon Strážnice, kiu okazos dum la tagoj 7-a - 9-a de aprilo 1989.

Partoprenos ankaŭ oficialaj reprezentantoj de E-asocioj el socialismaj landoj kaj pluaj eksterlandaj gastoj.

La ĉefaj punktoj de la programo estos: renovigo de la laboro de Kolektanta fako de ĈEA, kunlabore inter E-asocioj de socialismaj landoj je tiu ĉi fakkampo, la kultura programo, la intersangado de esperantaĵoj ktp.

Urbo Strážnice estas tutmonde konata dank' al la ĉiujaraj internaciaj folkloraj festivaloj.

La aliĝilojn, pluajn detalojn ktp., je la adreso: ESPERANTO, poŝtkesto 34, CS-696 62 STRÁŽNICE. -vlh-

### Pluaj kurs-finintoj de la skriba kurso

En pasintaj monatoj finis la skriban kurson de Esperanto ĉe kursestro ing. Vl. Kořvara:

MUDr. Miluše Bitnerová, Doubí 26, 751 24 Přerov-Vinary  
Věra Patočková, Ruská 1782, 735 06 Karviná-M. Město  
Libuše Krupičková, Mutěnická 5, 628 00 Brno  
Regina Holická, Albrechtická 16, 794 01 Krnov  
Dagmar Markupová, Zd. Hofbauera 553, 273 51 Unhošť  
La lastaj tri daŭrigas en la kurso por progresintoj.  
Al ĉiuj ni gratulas!



En la 1-a pasintjara numero de Starto ni aperigis fotografaĵojn de la membroj de centra komitato de ĈEA. Sed inter ili ni ne sukcesis aperigi la foton de s-anino Jiřina Vondráková. Tial ni aperigas ĝin nun.

# El la mondo de muziko

## Janáček estas en Parizo

Mi turnas sep fojojn mian skribilon en la mano, mi penas miajn vortojn... resume mi diras mur: atentul cefverko!

"Katia Kabanova" en la Palaco Garnier (Opero de Parizo) estas en la plej bonaj memoraĵoj, kiuj okazis en Opero. La direktoro Jean-Louis Martinaty enskribis ĉi-jare du verkojn de Leoš Janáček, li ekbruligis fajron, kiu - mi esperas - ne formortos!

La ĉefa komponisto, ludata ĉie en la mondo, estas finfine alte taksita de la francoj, kiel unu el la plej famaj lirikaĵ verkistoj de la periodo 1900-1930.

Parizo akceptis tiun verkon triumfe. La reprezentado estis komplete bona! Kune beleco kaj emocio! Enscenigo bona kaj natura, belaj dekoracioj, sed precipe la orkestro, estrita de la magia bastoneto de Jiří Kut, ĉefa estro, fariĝis bonega kiel povas deziri estro! Aldonu la maestran interpretadon de Karan Armstrong kaj Leonie Rysanek, kaj vere ni komprenas, ke estis triumfo!

En alia salonego, kun enscenigo de Volker Schloendorff, ni atendas multe de alia verko: "El la Domo de la Mortintoj". (Tradukita el gazeto Telegrama, aŭtoro de la artikolo Paul Meunier, 1988-03-02)

## Opavanoj en Torun

En pola urbo Torun efektiviĝis de 22-a ĝis 24-a de julio 1988 8-a internacia renkontigo de popolaj orkestroj kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo. Renkontigon, aranĝitan de Etnografia muzeo en Torun, partoprenis krom polaj orkestroj grupoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Jugoslavio. Ĉeĥoslovakion reprezentis popola orkestro "Opavští hudeci" el Opava, kiu prezentas Sileziajn popolajn kantojn kaj dancojn de Opava regiono. Orkestron gvidas Ing. Jan Kovařík, membro de Esperanto-rondeto en Opava kaj alia membro, Ing. Petr Barandovskí, ludas kordcimbalon. Tial oni povas konstati, ke orkestro sukcese propagandis ne nur silezian folkloron, sed ankaŭ ĉeĥoslovakian esperantistaron, pri kio atestas aparta premio de Esperantista publiko, kiun ĝi ricevis.

Jík

## EUROKKA - nova Esperanta asocio

Ĝi naskiĝis la 8an de Marto 1988. Ĝi okupiĝas pri la administrado de lokaloj por trejni rokajn grupojn (nuntempe estas dek-kvino da lokaj grupoj). Ĝi celas promocii Esperanton por diskonigi ĝin ĉe la rokaj grupoj kaj gejunuloj, per la Esperanto-Rokmuziko, informante per afiŝoj, glumarkoj, glu-etikedoj, disdonadoj de broŝuroj kaj informfolioj ktp., organizante Esperantajn rok-konzertojn kaj turneojn, elsendante Esperantajn programojn de loka radio-stacio, organizante Esperantajn kursojn aŭ stagojn speciale por rokaj gekantistoj, gemuzikistoj kaj gejunuloj el diversaj horizontoj, regule informante la lokajn gazetojn kaj radio-staciojn pri Esperanto kaj la Esperanto-Rok Grupoj.

EUROKKA kunlabore kun la du lokaj E-asocioj de Tuluzo, anigintaj al SAT kaj UEA, kreis Esperantan programon en la loka rok radio-stacio de Tuluzo: RADIO F.M.R. laŭ la frekvenco 89,10 Megahercoj dum duon-horo ĉiunmerkredo je la 13a loka horo (aŭ 11a horo UTC) kaj ĉiŝabate je la 9.30, loka horo (aŭ 7.30 UTC). La elsendoj enhavas E-Rokmuzikojn, intervjuojn, informojn eltiritajn el la E-a gazetaro, eltiraĵojn el E-aj elsendoj de internaciaj radio-stacioj, kalendaron pri stagoj, kursoj, kongresoj, renkontigoj, kaj iom da instruado. Estas elsendoj en la franca kaj Esperanta; ili komenciĝis la 23-an de Aprilo 1988. Skribu al: RADIO F.M.R., Esperanto-Redakcio, 9 bis Avenue Frederic Estébe, F-31200 TOULOUSE, FRANCO. (Laŭ Austria Radio Internacia, Vieno.)

# ●Somera

# ●Esperanto

# ●Tendaro

LANĈOV '88

Kiam ni proksimiĝas al Lančov tra Vranov, jam ĉe eniro al Vranov kateñas atenton de ĉiuj vizitantoj dominanta de Vranov-kastelo fiere altiganta super profunda valo. Ĉi tiu juvelo de la baroka arkitekturo, konstruita sur la loko de la iama kastelo, fondita de princo Vratislav, kaj kiu dum la tridekjara milito post ruinigo fare de svedoj forbrulis, estis rekonstruita laŭ plano de la glora aŭstria konstruisto Johano Fisher el Erlach. Poste ĝi estis kelkfoje reparita kaj kompletigita per diversaj riĉaj kolektoj. Veturante tra longaj arbaroj ni ekvidos la belegajn arbarscenojn kaj ni rapide proksimiĝas al Lančov.

En la Arĝenta golfo ĉe la vilaĝo Lančov, proksimume 3 km de digo jam 30 jarojn ekzistas Somera Esperanto-Tendaro, en kiu oni instruas Esperanton. La tendaron vizitis dum tiu tempo jam multaj miloj da esperantistoj preskaŭ el la tuta mondo. La tendaro okazas ĉiam dum julio kaj aŭgusto en tri dekkvartagaj etapoj. Diversgradaj Esperanto-kursoj arigas la lernantojn ĉiutage matene, sed ne dimance. Posttagmeze la programo konsistas el sportoj, naĝado, ŝipado, ĉar la tendaro proponas kelkajn ŝipetojn. Se ni decigos navigi per vaporŝipo 25 km, ekkapto nian atenton ne nur la naturbelajoj, sed ankaŭ la estinta lingardanto de Suda Moravio - burgo Bítov, konstruita jam en la 11-a jarcento. Kontraŭo de Bítov-burgo estas ruino de Corštýn, konstruita en la 13-a - 14-a jarcento.

Dum la lastaj 30 jaroj vizitantoj el la tuta mondo kreis internacian lingvan etoson.

En 1988 partoprenis:

La 1-a etapo:

180 partoprenantoj, la lastaj kvar tagoj 205 partoprenantoj, ĉar 25 bulgaraj gekursanoj alveturis antaŭtempe. Entute estis 11 kursoj, la "C" kurson instruistan tre sukcese gvidis s-ano D-rino Pavla Jodasová. Eksterlandaj partoprenantoj estis el Bulgarujo, Sovetunio, Germana DR, Nederlando.

La 2-a etapo:

168 partoprenantoj, entute estis 9 kursoj, "C+D" kurson gvidis s-ano prof. D-ro Rudolf Horský. Eksterlandaj partoprenantoj estis el Bulgarujo, Sovetunio, Germana DR, Hungarujo.

La 3-a etapo:

139 partoprenantoj, entute estis 7 kursoj. "C+D" gvidis s-ano Ing. Karel Janouš. Eksterlandaj partoprenantoj estis el Bulgarujo, Germana DR, Kamerunio, Angolo, Jugoslavio.

Je la 6-a horo kaj 30 minutoj estis vekigo. Eksonis fajfado kaj la konata kanto: "Vekigu ho dormantoj..." Ni tuj gimnastikis kaj poste matenmanĝis. Je la 8-a horo komenciĝis instruado - du instruohoroj, poste luncio, pluaĵ da instruohoroj kaj la kvina horo estis kantado. Sekvis tagmanĝo kaj poste amuzo, sporto, laŭ kies elekto.



Je la 18-a horo estis vespermango, je la 19-a "la viciĝo". Ni ĉirkaŭis la maston kun alte flirtantaj flagoj. En la frunto de la viciĝo staris la tendarestraro kaj la tagestro /por ĉiu tago estis elektita alia tendarano/ ordonis:  
Tendaranoj atentu!  
La tendarestro s-ano Pavel Sittauer tralegis la enkondukon de ordono.  
Tendaranoj ripozu!  
Daurigis legado de ordono. La legado estis finlegita kaj eksonis novaj ordonoj.  
Tendaranoj atentu!  
Flagtaĉmento marsu ek!  
Tendaranoj al la flagoj rigardu!  
Flagtaĉmento la flagojn malhisu!  
Dum la malhisado ni kantis la konatan kanton: "Per molaj paŝoj venas..."  
Kaj pluaj ordonoj.  
Flagtaĉmento marsu for!  
Tendaranoj rigardu rekten!  
Al hodiaŭa tago tri foje hura!  
Super la tuta tendarplaco sonis: hura, hura, hura!  
Disiru!

La viciĝo finiĝis kaj ĉiu tendarano konis la programon por morgaŭo.

Vesperojn ni ĝuis ofte ĉe la tendarfajro. kie ni amuziĝis laŭ la programo. La flamoj de la tendaro altiĝis kaj briligis la ĉirkaŭajn arbojn kaj siluetojn de la ĉirkaŭsidantoj. Dum la kantado kaj amuzo la fajreroj ŝvebis tra la arbkronoj al la nokta, stelriĉa firmamento. La partoprenantoj de ĉiu nacio prezentis sian nacian vesperon. Se pluvis, ĉiuj programoj estis okazigitaj en la mangejo, same kiel diskodancado, lumbildoj, ekspozicietoj, prelegoj kaj aliaj kulturaj programoj. En ĉiu kurso estis okazigita tuttaga ekskurso por trarigardi la ĉirkaŭajn kulturajn memoraĵojn.

Fino de nia kurso proksimiĝis kaj ĉiu el ni estis ekzamenita - perbuse kaj ankaŭ skribe. Dum la lasta vesperordono ĉiu ricevis la ateston laŭ sia merito kaj ni ĉiuj adiaŭis kun la novaj amikoj, bela medio de la tendaro, tendarfajroj, bona kaj abunda manĝaĵo, bonaj kaj zorgemaj tendarestraroj. Kiam poste je fino de tago ni eksidis antaŭ la kabaneto kaj auskultis mallautan melodion de nokto, ni eksopiris denove reveni al la lokoj tiom malproksimaj de la rapidema ritmo de la moderna civilizacio.

Esperanto-klubo en Třebíč jam 36 jarojn zorgas sukcese pri Somera Esperanto-Tendaro, sed la 5-an de aŭgusto 1988 festis la tendaro jam la 30-jaran datrevenon de la Somera Esperanto Tendaro en Lančov ĉe la Argenta golfo.

Dank' al ĉiuj anoj de E-klubo en Třebíč por multaj amikecoj inter la homoj, por la disvastigado kaj la perfektigado de Esperanto.

Křesinová





La fotografaĵoj faritaj de ing. L. Veselý el Praha revenigas nin al la pasintjara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov en suda Moravio. La tendaranoj tre volonte satstudis kaj satmangis kaj la instruistoj prof. Horaký kaj s-ano Vondroušek estis tre kontentaj. Precipe sukcesaj estis la kandinstruadoj de s-anino Vlková.

Inĝ. Josef Vojáček - Modernaj instrumentadoj kaj eblecoj de ilia aplikado en la lingvoinstruado

## 1. Enkonduko

Mi komencos per vortoj de forpasinta profesoro doktoro István Szerdahely el lia prelego dum ILEI-konferenco en Gödöllő apud Budapeŝto en la jaro 1981: ".... Por mi sufiĉas tabulo kaj kreto. Mi ne tro satas tiujn modernajn aparatojn, kiel projekciilojn, ĉar ili bruas, necesas mallumo, kiu interrompas kontakton de instruisto kun gelernantoj, ili malbone povas fari notojn kaj tia aparato povas difektigi, kio aldonus pliajn problemojn ...." Tio estas vero kaj por bona pedagogo, kiu estas alkutimiginta je kreto kaj tabulo, ĝi estas la plej oportuna metodo. Ankaŭ malbona pedagogo ne farigos bona, kiam li uzos modernajn teknikajn aparatojn. Maksimume ili povas helpi al li kaj plifaciligi lian laboron. Sed la ĝenerala progreso iras plu kaj ni ne povas ĝin neglekti ankaŭ en pedagogio. En la instruprocendo necesas efiki laŭeble je ĉiuj sensoj de gelernantoj, kiel instruis nin jam Komenio. En tio helpas tiuj aparatoj kaj instruisto, kiu prudente kaj sentroige uzas ilin, certe havos pli bonajn rezultojn.

Sed ne ĉiam necesas tiuj teknikaj aparatoj. Kiu el vi legas Budapeŝtan Informilon, certe rememoras artikolojn pri "fiŝkaptistaj" intensaj rapidkursoj de Esperanto, kiujn gvidas en Budapeŝto s-ro Horváth. Mi mem partoprenis unu lian modelan lecionon, prezentitan dum VEF/Vintra Esperantista Feriado - ŝajnas al mi en la jaro 1980/kaj ĝi tre plaĉis al mi. Ankoraŭ mi volas menci i unu pretendeman metodon, bone konatan inter esperantistoj, t.e. Ĉe-metodo. Ĝi estas tre postulema je instruisto kaj lia preparo, sed se oni ĝin kombinas kun pli simpla metodo, povas atingi bonajn rezultojn - tio certe estas nenio nova.

Laŭ mia opinio en Ĉeĥoslovakio ni postrestas tiudirekte kaj estas bone organizi kursojn por instruistoj kaj tiamaniere plialtigi nivelon de Esperanto-kursoj. Certe tio pozitive respeguligus en intereso pri kursoj.

## 2. Aŭdvidaj aparatoj en instruado

Mi esperas, ke la eblecoj de uzo de gramofondiskoj, magnetofonoj, diapozitivaj aŭ filmaj projekciiloj en lingvoinstruado estas por ĉiuj bone konataj. Pri videomagnetofonoj mi ne parolos, ĉar ĉe ni ili estas ankoraŭ raraj. Mi volas preferi paroli ne pri ilia uzado, sed pri la instrumaterialoj, prezentataj per ili, kunlige al miaj propraj spertoj.

Kursoj de Esperanto sur gramodiskoj aŭ magnetofonkasedoj bone helpas komprenon de parolo al gelernantoj, sed por pli larga uzo de tiaj lecionoj dum la kurso necesas ankaŭ koncernaj lernolibroj, kiuj kutime ne estas al dispono en pli granda kvanto. Mi mem havas

polan kurson sur gramodiskoj, kiun mi surbendigis kaj la unuajn lecionojn mi uzas por ripetado en kursoj. Tio plivigligas la instruadon kaj ĝojigas gelernantojn, ke ili jam komprenas ĉi tiun parolon. Por progresintoj eblas uzi ankaŭ diskojn aŭ bendojn kun kantoj. Se ili estas kantemaj, ili povas ankaŭ kanti - kompreneble por tio ne necesas nepre disko aŭ bendo.

Multe efikaj en instruado estas surbendigitaĵoj kun diapozitivaj. Dum mia restado en Budapeŝto en 1980-a jaro mi akceptis inviton de unu instruisto en lernejon, kie li instruas i.a. Esperanton. Li prezentis al mi parton de surbendigita leciono kun diapozitivaj. La kompletan kurson ili ricevis el Instituto de pedagogia kibernetiko el Paderborn el FRG. Dum konferenco "Interkibernetik 82" en Budapeŝto mi demandis ĉu Frank el Paderborn, ĉu estas eble ricevi ĉi tiun kurson. Li donis al mi nomon de respondeculino pri tiuj aferoj kaj post kelkobla korespondado mi ricevis unue lernolibron kaj poste unu kasedon kun lecionoj 12a, 12b kaj diapozitivaj al la leciono 12a. En Ĉeĥoslovakio mi nek vidis nek audis pri tiaspecaj kursoj, kaj mi opinias, ke akiro de unu kurso el Paderborn kaj sekva multobligo ĉe ni povus multe helpi en instruado de Esperanto en niaj lernejoj. Se estus eble ricevi la kurson /kaj en Paderborn ili verŝajne havas diversajn, ĉar tiu leciono, kiun mi ricevis, ne apartenas al tiu kurso, kiun mi vidis en Budapeŝto/, tio kompreneble estus pli facila ol krei novan.

Lumbildoj kun voĉo el la kasedo kompreneble ne povas anstataŭi instruiston. Klarigo de gramatiko, ekzercado de lecionoj, legado kaj konversacio - tio ĉio estas eroj de la instruprocedo, kiuj bezonas instruiston. Projekciado kun magnetofono povas bone kompletigi la metodojn. Ĝi pliinteresigas gelernantojn kaj estas bona sango en la instruado. Dank' al tio kaj ĝia demonstreco ĝi plifaciligas enkapigon de instrumaterialo. Nur la optimuma ekvilibro inter ĉiuj metodoj rezultas la bonan tuton.

### 3. Komputiloj kaj komputilaj sistemoj en instruado

Disvolvo de elektroniko kaj sekve de komputiko en lastaj jardekoj kaŭzas disvastigon de komputiloj kaj ilian uzadon en diversaj fakoj. Tio inkluzivas ankaŭ lernejojn. En la lastaj jaroj servas komputiloj ne nur en ekonomia kaj administra fakoj de lernejoj, sed rekte en instruado. Plejparte temas pri mikrokomputiloj. Unuflanke ni havas komputikajn studobjektojn, kiel konstruado kaj funkciado de komputiloj, ilia uzado, priservado kaj programado kaj aliflanke la ceterajn studobjektojn. Eblecoj kaj bezono de uzado de komputiloj en natursciencaj objektoj, kiel matematiko aŭ fiziko, estas evidentaj. Ili povas servi precipe por elkalkuloj laŭ diversaj kalkulmetodoj dum la instruado, sed eblas uzi ilin ankaŭ nerekte, ekzemple por preparado de taskoj per genero de diversaj variantoj kaj ekzameno. La lasta estas uzebla generale en ĉiuj studobjektoj.

Por pluaĵo konsideroj ni faru la sekvan klasifikon:

- a/ Simplaj mikrokomputiloj.
- b/ Mikrokomputilaj didaktikaj sistemoj.
- c/ Mikrokomputilaj terminalaj klasĉambroj.

a/ Simplaj mikrokomputiloj

En Ĉeĥoslovakio en mez- kaj altlernejoj estas vaste uzataj mikrokomputiloj IQ 151 kaj PMD-85. Ankaŭ estas uzataj Didactic alfa

/resp-e gama/. En la lingvoinstruado ili ne havas /almenaŭ ĝis nun/ grandan eluzon. Tamen mi havas kiel ekzemplon de ilia ebla uzado, unu programon en programlingvo BAĜIC, kiu servas por instruado aŭ ekzamenado de vortoj. Bedaurinde ĝi estas sen supersignoj /sed estus eble ankoraŭ aldoni ilin/. En la programo estas serioj po 10 vortoj /2 x 5/ kaj ĝi laŭvice demandas kaj atendas traŭkon de unuopaj vortoj. Poste indikas, ĉu la respondo estas bona aŭ ne kaj fine donas la noton kaj demandas, ĉu ripeti la nekonatajn vortojn. Unu ĉi tiun ciklon montras la bildoj, kiuj estas kopioj de ekrano per presilo.

Aliaj eblecoj de mikrokomputilaj aplikadoj estas en prezentado de tekstoj - eble ankaŭ kun bildoj-sur la ekrano, klarigado de gramatiko kaj ekzercado sur la ekrano k.s. Tamen ni povas pensi pli pli larga uzado de tiaj metodoj nur en estonteco.

#### b/ Mikrokomputilaj didaktikaj sistemoj

La plej simplaj didaktikaj mikrokomputilaj sistemoj konsistas el mikrokomputilo kaj serioj da butonoj por ĉiu lernanto, per kiuj oni elektas la ĝustan respondon /el a, b, c, ..../ kaj la komputilo registras ĉerarojn. Por la uzado en la lingvoinstruado estas ĉi tiu sistemo iom unuflanka; per ĝi eblas ekzemple testi komprenon de prezentita teksto, al kiu estas starigitaj alternativaj demandoj.

En fabriko Metra en Blansko estas produktata sistemo Hvězda /Stelo/. Ĝi konsistas el mikrokomputilo, al kiu estas alkonectitaj terminalo por instruisto, 16 aŭ 32 terminaloj por gelernantoj, televidmonitoro kaj fotolegilo kaj truigilo de trubendo. Ĉiu terminalo havas simplan datumvidigilon por kelkaj karakteroj kaj klavaron. Instruista terminalo havas kelkajn pluaĵajn regadoklavojn. Sur la monitoro vidas instruisto rezultojn de laboro de unuopaj gelernantoj. La sistemo povas labori en kelkaj reĝimoj. Dum instruado de nova materialo povas la sistemo doni al instruisto retrokoplon, kiu tuj per nombro da bonaj respondoj de gelernantoj ebligas kontroli komprenon de instruataĵaj novaĵoj. Por ekzamenado estas elekteblaj kelkaj metodoj: eblas daŭrigi komune aŭ po grupoj, laŭvice aŭ kun ebleco de elekto de la sekvanta tasko, kun ebleco de korekto de jam forsendita respondo aŭ sen ĝi. Instruisto devas prepari kaj multoblige tekston kun la instrumaterialo kaj demandoj kaj trubendon de strukturo de la testo kun la ĝustaj respondoj. La demandoj povas esti ankaŭ diverstipaj - por elekti unu aŭ kelkajn respondojn el la proponitaj aŭ respondi per tuta vorto aŭ frazo k.s. Similan testprogramon eblas programi ankaŭ por unu mikrokomputilo. La eblecoj de ĉi tiu sistemo estas pli largaj ol de tiu antaŭa, sed por la lingvoinstruado ankaŭ ĝi ne donas la plej konvenan metodon, ĉar por la instruado de Esperanto ekster la lernejoj ĝi estas apenaŭ atingebla.

#### c/ Mikrokomputilaj terminalaj klasĉambroj

Tio estas la plej efikaj kaj la plej universalaj instrusistemoj. Ĉiuj laborlokoj por gelernantoj estas ekipitaj krom mikrokomputiloj per nigroblankaj aŭ nun pli ofte per koloraj televidmonitoroj kaj klavaroj, eble ankaŭ per aliaj aparatoj, kiel eble lumplumo. Alivorte temas pri terminala reto, kiun regas pli granda komputilo el la familio de mikro- aŭ malgrandaj komputiloj. Pluaj teknikaj detaloj kaj tipoj de la sistemoj certe ne necesas.

Mi transiros al ilia uzado el flanko de pedagogoj. Gestudentoj povas labori ĉi tie aŭ memstare aŭ komune. Por la memstara laboro ili povas peti de la sistemo aŭ instruilecionojn aŭ taskarojn por plenumi ilin. La rezultojn storas la ĉefkomputilo kaj ili ĉiam estas al dispono por instruisto, kiu povas laŭ bezono elvoki ilin per antaŭe difinita ŝlosilo kaj kontroli, kiu plenumis kiajn taskojn kaj kun kiaj rezultoj. Dum la komunaj lecionoj povas instruisto kombini aŭ kompletigi la instrumaterialon el la komputilo per filmo, lumbildoj, ĉe per la klasika tabulo kaj kreto. Tamen la pli grava tasko de instruisto estas prepari la instrumaterialon. Tio estas laboro, en kiu ne povas lin anstataŭi programisto aŭ alia fakulo. Kontraŭ tio ne necesas, ke la instruisto estu programisto. Li devas nur lerni kaj respekti kelkajn principojn, laŭ kiuj oni kreas la lecionojn kaj testojn. Programaro de la sistemo enhavas malplenajn rikordarojn, kiujn necesas plenigi. Tio estas prefera pedagogia problemo kaj ne komputika. Nur el la flanko de priservado de la sistemo /la gusta uzado de kelkaj ordonoj k.s./ la teknika.

La granda multflankeco, elasteco, dinamikeco kaj universaleco de la sistemo donas tre largajn eblecojn de ĝia uzado en ĉiuj instruobjektoj inkluzive de lingvoinstruado. Kreado de lingvokurso por tia sistemo esence similas al prilaboro de lernolibro, sed ĝi estas ankoraŭ pli larga. Necesas respekti la eblecon de individua antaŭeniro. Por pli malfortaj gestudentoj necesas pli da ripetado kaj ekzemploj, por pli fortaj pli postulemaj taskoj. Laŭ respondoj de kontroltaskoj la programo povas elekti la sekvan branĉon de la programo por daŭrigo, sed tio jam devas esti antaŭvidata dum la preparo de lecionoj.

Simile kiel en la antaŭa parto mi devas ripeti, ke ni ankoraŭ ne povas supozi aplikadon de tiuj sistemoj en instruado de Esperanto, sed ni sciu pri ili kaj kiam venos ebleco de ilia uzado, ni estu pretaj por tio.

#### 4. Konkludo

Progreson en instruado de Esperanto povas alporti ne nur modernaj aparatoj. Certe ne ĉie instruas en Esperanto-kursoj profesiuloj, sed ankaŭ por profesiaj instruistoj, kiuj ne instruas lingvojn, estus utila kurso aŭ seminario orientita al instruado de Esperanto, kurson de ĉe-metodo certe bonvenigus ankaŭ pli spertaj instruistoj. Tio estas eblaj temoj por laborplano de pedagogia sekcio. Plua tereno estas kursoj sur gramofondiskoj aŭ magnetofonbendo, eble ankaŭ kun lumbildoj. Ĉi tie estus inda kunlaboro kun Instituto de kibernetika pedagogio en Paderborn en FRG, pri kio mi jam menciis.

Por posedantoj de personaj mikrokomputiloj oni povus prikonsideri preparon kaj disvendon de surbendigitaj programoj de Esperanto-kurso, sed dank al multaj tipoj de mikrokomputiloj estus necesaj kelkaj versioj por ili kaj tio verŝajne estus malprofita afero. Kiam estos Esperanto enkondukita en lernejojn almenaŭ kiel nedeviga objekto, tiam povas esti aktuala kurso por komputilaj terminalaj klascambroj. Tiam helpos kunlaboro de pedagogia sekcio kun komputista grupo de STS de ĈEA.

# KONVERSACIO por progresintoj



Dekoka temo: F A Ŭ N O

Faŭno estas ciuj animaloj de certa teritorio, epoko aŭ sezono. Vertebruloj estas animaloj kun skeleto, kiu konsistas el ostoj. Mamuloj naskas vivajn idojn, pri kiuj ili poste zorgas. Sur korpoj ili havas felon, iam kun haroj. Mamulojn oni nomas plej ofte bestoj. Rabobestoj mangas aŭ voras aliajn bestojn, ili estas karnovoraj. Galputoro estas malgranda, hieno kaj ŝakalo voras ĉefe kadavrojn, leono, leopardo, pantero kaj tigro estas ĉe ni nur en zologiaj gardenoj, ili similas al kato, same kiel linko. Lutro vivas en akvo, lupo kaj bruna vulpo similas al hundo. Mustelo estas malgranda, urso plej granda. Hejmaj bestoj aŭ brutaro estas bredataj pro laboro, lakto, graso, viando, gardado kaj plaĉo. Azeno, boaco aŭ ranĝifero, bovo, ĉevalo, hundo, kapro, kato, kuniklo, porko kaj ŝafo estas plej konataj. La homo miksas ilin rase, ekestas diversaj hibridoj aŭ bastardoj. Precipe hundoj havas diversajn rasojn, kiuj povas havi postulojn. Mulo estas basterdo de ĉevalo kaj azeno, plej ofte sen postuloj. Aliaj bestoj estas casataj. Apro estas sovaĝa porko, ĉamo bone grimpas sur deklivoj, cervo, damao kaj kapreolo havas kornobranĉojn sur kapoj. Kastoroj vivas en akvoj, leporoj bone kuras. Aliajn bestojn la homo persekutas, ĉar ili malutilas. Arvikolo kaj muso estas similaj, rato estas granda muso, hamstro amasigas provizojn de greno en sia kusejo, talpo faras talpaĵojn sur herbejo. Putoro malbonodoras. Aliaj bestoj: sciuro zigle kuras en arboj, erinaco havas akrajn dornojn, melo kaj zizelo viglas dumnokte. Vesperto flugas. Kobajo estas bredata pro eksperimentoj. Zibelo estas bredata pro bela felo. En maroj vivas granda baleno, inteligenta delfeno, foko kaj rosmaro. Ili eĉ na havas gambojn. La akvon elserĉas ankaŭ porksimila hipopotamo, rinocero havas kornojn sur la nazo, plej granda estas elefanto kun rostro. Utila besto de dezertejoj estas kamelo, ĝirafa havas longan kolon, zebro estas simila al ĉevalo, antilopoj estas pluraj herbovoraj mamuloj. Alko estas simila al cervo, kanguruo estas tipe mamulo de Aŭstralio, histriko estas simila al erinaco. Simioj estas plej similaj al homoj, kiuj science estas kalkulataj ankaŭ al mamuloj.

Birdoj havas bekon kaj plumaron, ili metas ovojn en siaj nestoj. Rabobirdoj estas karnovoraj. Aglo, falco, kirko, subuteo kaj tinunkulo estas diverse grandaj. Vulturoj voras kadavrojn, gufo, noktuo, sirnio kaj strigo estas ĉefe noktaj birdoj. Hejmaj birdoj estas anaso, ansero, koko, kolombo, meleagro, numido, pavo kaj turto. Al ĉasbirdoj apartenas: fazano, koturno, perdriko, rustikolo, skolopo, tetro, urogalo. Aliaj birdoj: alciono, alaŭdo, cikonio, fringelo, garolo, hirundo, flava kanario, kanio, griza korniko, nigra korvo, kukolo, merlo, mevo, najtingalo, papago, kiu kapablas



imiti la homan voĉon, paruo, pasero, pego, pigo, ralo, regolo, struto, kiu estas plej granda, sturno, turdo, vanelo. Kolibro estas malplej granda birdo. La birdoj havas anstataŭ antaŭaj gamboj flugilojn, ili kapablas flugi. Kelkaj birdoj dum malvarma sezono flugas al pli varmaj teritorioj. Ili scias bone la direkton. Cignoĵ estas grandaj birdoj, kiuj bone nagas en akvo, la graso ŝirmas ilian korpon.

Fiŝoj vivas en akvo kaj spiras per brankoj. Sur la korpo ili havas skvamojn, anstataŭ gamboj estas nagiloj. Ilia semo estas fraĵo. Al ili apartenas: alburno, angilo, kiu estas serpentforma, barbio, bramo, ezoko, gado, haringo, hipogloso, karpo, merlango, perko, salmo, sandro, sardelo, siluro kun ia barbo ĉe la buŝo, tre danĝera ŝarko, tinko, tinuso kaj truto. Kelkaj fiŝoj vivas en mara akvo, aliaj en rivera kaj laga akvo, malmultaj povas esti en ambaŭ akvoj. Kelkaj kapablas esti longe en la aero. Amfibioj estas animaloj, kiuj vivas parte en akvo, parte sur la tero. Al ranaj apartenas bufo, kiu aspektas malsimpatie, kaj hilo, kiu estas bele verda. Testudo havas solidan ŝildon sur si. Salamandro kaj trito vivas en malprofundaj akvoj. Serpentoj estas reptilioj sen gamboj, ili rampas sur la tero, En niaj landoj estas nur venenigaj vipuroj kaj senvenenaj kolubroj. En aliaj landoj vivas pli longaj serpentoj boao kaj pitono estas senvenenaj, kobro kaj krotalo venenigaj. La veneno estas en dentoj. Al saŭroj apartenas angviso, kiu ne havas gambojn, malgranda lacerto, en tropikaj landoj estas krokodiloj kaj varanoj. Kameleono ŝanĝas tre facile koloron de sia haŭto. Al saŭroj apartenis multaj animaloj, kiel igvanodonto, brontosauro, stegosauro. Ili estis tre grandaj, sed ilia nerva sistemo estis neperfekta.

Krom birdoj kaj mamuloj la ceteraj vertebruloj ne zorgas pri siaj idoj. Mamuloj kaj birdoj estas varmosangaj, homojotermaj, nome la temperaturo de ilia korpo estas ĉiam la sama, eĉ se ekstere estas temperaturo konsiderinde malalta.

Artikuloj estas kategorio diferenca de vertebruloj. Ili havas palpilojn kaj elitrojn. Insekto ekestas el krizalidoj kaj raŭpoj. Abelo kolektas mielon, burdo, krabro kaj vespo estas similaj. Kelkaj insektoj flugas. Sur la tero estas formikoj, nokte lumas lampiro, vespere oni aŭdas grilojn, sur la herbejo saltas verda lokusto, akrido estas en tropikoj, iam pro multeco ili fariĝas katastrofo por certa teritorio. Papilio havas belajn flugilojn, faleno estas nokta papilio. Skaraboj estas artikuloj kun elitroj. Kokcinelo havas rujan dorson kun nigraj punktoj. Melolonto estas majskarabo, dendrofago kaj termito detruas lignon, geotrupo vivas en fekaĵoj, lukano estas tre granda skarabo, skorpio estas malagrabla. Nekroforo kaj cerambiko estas malgrandaj skaraboj. Parazitoj vivantaj en logejoj estas araneo, kiu pendigas araneajojn, muŝoj kaj kuloj, kiuj sroge pikas, pediko vivas en haroj, pulo eĉ sur homa korpo, bleto kaj cimo en mebloj, forfikulo penetras en orelon, samkiel ostro kaj tabano. Vermoj estas animaloj tre simplaj. En la tero vivas lumbriko, sed askarido kaj tenio vivas en korpoj. Al aliaj kategorioj apartenas heliko kun dometo, simila limako, sed sen dometo, kankro kun preniloj, animaloj kun konkoj, polpo kun tentakloj.

Mikroskope videblaj animaloj kaj multaj maraj tre similas al vegetaĵoj. Maraj aktinioj, koraloj, meduzoj kaj spongoj manĝas aron de mikroskopaj animaloj aŭ vegetaĵoj, kiu nomigas sume planktono. Tiun manĝas ankaŭ baleno.

Bestoj blekas, kvakas, murmuras, hundoj bojas, hojlas kaj grumbas, katoj miaŭas, serpentoj kaj anseroj siblas, birdoj cirpas, pepas, kantas, kokoj koketikas, kveras, klukas, turtoj kaj kolomboj rukulas. Oni nomas ĉi alie tiujn sonojn. Insekto zumas, kelkaj bestoj mugas, hurlas aŭ ululas. Buŝo de bestoj, precipe malfermita, estas faŭko.

Animaloj estas vir- kaj ineksaj, nur tiuj plej simplaj multigas per dividado. La homo multe influis la sekson de brutaro. Ekzemple ĝenerala nomo de koncerna besto estas bovo. Virbovo estas plej ofte kastrata, nur malmultaj restas pro gravedigo de bovinoj. Tiuj liveras lakton kaj naskas bovidojn. Pro viando estas gravaj virbovidoj, dum bovidinoj ankoraŭ ne estis gravedaj, do ili taŭgas por plua bredado.

La scienco pri animaloj estas zoologio, en ĝi estas pluraj branĉoj, ekzemple entomologio pri insektoj, herpetologio pri reptilioj. Kelkaj homoj havas hejme akvariojn, terariojn, alie la bestoj estas bredataj en staloj, zoologiaj anguloj kaj ĝardenoj.

#### GRAMATIKO:

1. Kiu persona pronomo estas uzata por signi bestojn kaj animalojn?
2. Ĉu vi konas specialajn nomojn por virbestoj?  
Ekzemple "virbovo" "virkapro"
3. Nomu dek bestidojn en taŭgaj frazoj

#### STILO:

1. Skribu al via eksterlanda amiko pri la faŭno de via lando
2. Preparu dialogon inter infano kaj plenkreskulo en zoologia ĝardeno
3. Skribu pri kortbirdaro

#### DEMANDOJ:

1. Kiuj bestoj liveras viandon?
2. Nomu dombestojn kaj menciu, kial oni bredas ilin
3. Kiuj bestoj estas aljungataj?
4. Sur kiuj bestoj oni rajdas?
5. Kiel oni selas bestojn?
6. Kion sekvigas insektoj per siaj piko?
7. Kiam la animaloj minacas homojn?
8. Kion vi scias pri la evoluo de bestoj?
9. Kiu lakto estas uzata en kuirado?
10. Ĉu vi konas uzadon de aliaj specoj de laktoj?

Josef Chvosta

# loka kroniko

## TRIA KULTURA FESTIVALO

okazis de la 30a de septembro ĝis la 2a de oktobro 1988 en Domo de kulturo en Ústí nad Labem.

La lan de oktobro okazis solena artisma programo omage al d-ro Tomáš Pumpr kaj Jiří Kořínek. La vivon kaj verkon de ambaŭ internacie konataj literaturistoj pritraktis J. Mařík (Praha) kaj d-ro V. Novobilský (Ústí n.L.).

Post la enkondukaj vortoj sekvis artisma programo, en kiu estis alterne prezentitaj operarioj, kantoj, recitoj kaj violonludo. La muziktekstoj, poemtradukoj kaj originalaj versoj estis prenitaj el la verkoj de ambaŭ jubileuloj.

Rolis membroj de la Stata operdomo en Ústí n.L.: Libuše Ziková (soprano), Pavel Ingeli (tenoro), Miroslav Smyčka (baritono), Jiří Endršt (baso) kaj Jan Zimmel (pianakompano). Poemtradukojn de T. Pumpr kaj J. Kořínek kaj originalajn poemojn de J. Kořínek prezentis E. Seemannová (Praha). Violon-solojn prezentis J. Duda (Filharmonio Olomouc).

La trihora programo prezentis kulminon de la ĝisnuna Esperanta koncert-serio aranĝata fare de Esperanto-grupo en Ústí nad Labem.

La programon partoprenis Jiří Kořínek kaj ĉ. 40 ges-anoj venintaj el diversaj lokoj de ĈSSR kaj GDR.

Krom la artisma programo la partoprenintoj ĉeestis interkonan vesperon, autobusan ekskurson al la rokaro Tisá, viziton al la burgo Střekov kaj viziton al la kastelo en Duchcov.

Por la 20-a de oktobro 1988 oni invitis s-anon Jiří Kořínek en la Valdštejn-palaco en Prago por transdoni al li la honoran titolon "Merita laboranto de kulturo". Bedaŭrinde pro la malbona sanstato de la honorigito la ministro de kulturo transdonis la honorigon al reprezentantoj de la nordbohemia regiona nacia komitato, kiuj poste transdonis la honoran titolon al s-ano Jiří Kořínek en Ústí nad Labem. Okazis unufoje en la historio de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, ke la plej alta honorigo en la kategorio de amatoraj kreantoj estis atribuita pro esperantlingva kreado.

Lastmomente venis la trista sciigo, ke la Honora membro de ĈEA kaj Merita laboranto de kulturo s-ano Jiří Kořínek mortis la 4-an de novembro 1988 en aĝo de 82 jaroj. Rememoron pri li ni aperigos en la venonta numero de Starto.

## 80 JAROJ DE LA UNUA ESPERANTA SOCIETO EN OSTRAVA

Laŭ nuntempaj scioj unuaj esperantistoj aperis en Ostrava baldaŭ post naskiĝo de Esperanto. Plej malnovaj raportoj atestas, ke en la jaro 1894 grupetoj de esperantistoj jam kunvenadis diversloke en Ostrava kaj ĉirkaŭaĵo. Sed nur en la jaro 1909 decidigis kvar entuziasmuloj fondi en Vítkovice societon oficiale atestitan kun propra statuto. Ili estis: Jan Gabzdyl, komence volapukisto, masinisto ce minejo Louis (nun Jeremenko), Arnošt Janečka, komercisto (vidu Esp. enciklopedion), Eduard Sedláček, tornisto, Jan Sikora, meblisto. Nova societo, kies statuto estis aprobita de tiama Moravia landa ofico junio 1909 portis nomon eble por tiama tempo bone taktike elektita: Societo de enigmistoj, sakistoj kaj esperantistoj el Ostrava kaj ĉirkaŭaĵo en Vítkovice. Jan Gabzdyl, la unua prezidanto de ĉi tiu societo, bedaŭrinde mortis subite en la jaro 1911. Tio dumtempe paralizis disflorantan agadon de la societo. Sed post nelonga tempo aperadis en najbaraj urboj (nun kvartaloj de Ostrava) pliaj Esp. societoj. La unua, kiu nunjare jubileas, postvivis du mondmilitojn, sangis kelkfoje nomon, superajn organojn, societan strukturon, juran staton k.s., sed prosperas ĝis nun. Samtempe ekzistas kiel baza organizo de ĈEA: Esperanta klubo Vítkovice. Sukceson al ĝi por venontaj jaroj.

Janouš

# loka vivo

## D Ě Č Í N

De la 9-a ĝis la 15-a de julio 1988 la turista sekcio de LD Děčín aranĝis semajnan restadon en kabanjoj en Hovézí en Vsetín-distrikto. Dum la restado en la belega medio estis aranĝita kurso de Esperanto, kiun partoprenis kvin turistoj. Vespere okazis instruado de Esperanto kaj dum turismaj ekskursoj tra la ĉirkaŭaĵo oni ekzercis konversacion. Oni logis en kabanjoj po du personoj. La prezo por persono kaj tago estis 18,- Kčs, membroj de ČSTV havis K,- Kčs rabaton. Se estos sufiĉa intereso, la restado kun kurso de Esperanto povus okazi ankaŭ ci-jare. Aliĝojn kaj informojn sendas Oldřich Toman, Kosmonautů 172, 405 01 Děčín-Březiny. (Lau Libereca Informilo)

## K O L Í N

Pasintjare en februaro en hemia fabriko en angla dialogo demandis sinjoro N.K.Bathia el Olpad en Hindio pri la loka Esperanto-klubo, de kiu li havis sciigojn. Lia kunlaborantino kaj tradukistino estis hazarde g-anino Alena ROUŠAVÁ, kiu tuj al li proponis viziton de la klubo. Ambaŭ venis kaj ĉiuj geesperantistoj parolis pri tiaj kaj hindaj problemoj kaj pri Esperanto en ambau landoj. Post tre bela enskribo en la kluban kronikon ĉiuj adiaŭis kaj poste oni sendis al li komunan fotografaĵon.

## L I B E R E C

(Dr. Zdeněk Krupka)

En la tagoj la 8-an kaj la 9-an de majo 1988 okazis marŝo Ještěd-Kozákov, kiu estis organizata jam la 5-an jaron. La vetero estis vere belega kaj humoro de la partoprenantoj, kiuj sume estis dek sep, kontribuis al sukceso de la 40-km marŝo. La celloko, bieno de samideano Koudelka, estis agrabla ripozejo por ĉiuj partoprenantoj el Liberec, infanrondeto "Verda Steleto", el Chlumec n/C, Děčín, Dolní Dobrouč kaj Tuhán. Ĝis la revido ankaŭ ci-jare!

(Libereca Informilo)

## O L O M O U C

En la tagoj 13-17-a de junio 1988 vizitis urbon Olomouc grupo de Asocio por finno-ĉeĥoslovaka amikeco el gemelurbo Tampere. En la grupo krom oficiala reprezentanto de la urbo Tampere estis ankaŭ tri esperantistoj - membroj de tiea Esperanto-klubo Antaŭen, nome s-anino Sylvia Hämäläinen, s-anino Sonja Maijanen kaj s-ano Veli Hämäläinen. Por ili la programon preparitan de urbestro de Olomouc pliricigis anoj de Esperanto-klubo en Olomouc per konatigo kun diversaj lokaj Esperanto-memorindaĵoj. Jaude la 16.6. honore al la gastoj estis kunvokita eksterordinara klubo kunveno, dum kiu la finnaj gastoj projekciis diapozitivojn pri la urbo Tampere kaj s-anino Sylvia Hämäläinen prelegis pri finna eposo Kalevala, kies esperantlingvan tradukon ili decidis al E-klubo en Olomouc.

La 28-an de junio 1988 vizitis kluban kunvenon de esperantistoj en Olomouc sovetia studentino s-anino Jelena Sirotina el Volgograd kaj informis pri multflanka poresperanta agado en tiu ĉi grava soveta urbo.

(Karásková-Dr. Mohapl)

## O P A V A

La membroj de la E-rondeto de ZK ROH Ostroj Opava faris apartan laborbrigadon por kompletigi la libron "Písemný kurs esperanta" (Koresponda kurso de Esperanto). Oni kompletigis 4200 lernolibrojn kaj forsendis ilin al la sekretariejo de ĈEA en 40 paketoj. Oni laboris dum 198,5 horoj, la brigadon partoprenis 16 membroj kaj du famillianoj-neesperantistoj. Plej longan labortempon plenumis: V. Kočvara 54 horojn, J. Solnický 17, M. Matýsková 13, M. Grimmová kaj ing. J. Černý po 12,5 horojn.

En septembro 1988 la rondeto aranĝis tre sukcesan Esperantistan Kulturajn Festivalon (legu sur pg. 9), kiun partoprenis pli ol cent geesperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj.

## P R A H A

Inter la 20-a kaj 26-a de junio 1988 estis aranĝita ekspozicio de infanaj desegnaĵoj en la klubejo en Vojvodova strato en Praha 1 (proksime de la asocia sekretariejo). La temo de la ekspozicio estis: "Esperanto - paco - amikeco inter nacioj". La ekspozicion vizitis ĉirkaŭ 150 personoj, inter ili infanoj el art-rondetoj kaj eksterlan-



daj vizitantoj el Hungario kaj Sovetunio. En la memorlibro estas multaj subskriboj kaj ankaŭ belaj aprezoj de la desegnaĵoj. La ekspozicio estis sukcesa kaj bone propagandis Esperanton al la neesperanta publiko. (Sihelník)

#### P Ĥ Í B R A M

Esperanto-Rondeto en Přebíram sendis al la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto (GEI) pere de s-ano Pachter kelkajn esperantaĵojn, inter ili la Bohemajn Grenatojn de Schulhof kaj Geologion Internacian. GEI preparas katalogon de titoloj de libroj kaj de periodaĵoj. La nun pretigata nombro de titoloj jam atingis 8.000. Kunlabore kun bibliotekoj de la tuta mondo ĝi intersange largigas sian enhavon. S-ano Pachter, kiu entuziasme laboras por ĉi tiu biblioteko kaj ofte vizitas la najbarajn landojn, volonte helpus ligi kontaktojn inter niaj bibliotekoj kaj tiu de GEI. Ni estas konvinkitaj, ke la intersango de titoloj estus utila por ĉiuj. Ja eldoni katalogojn pri libroj kaj periodaĵoj estas por la unuopaj bibliotekoj multekosta kaj temporaba afero. Ĉu la biblioteko de EK Praha, de Brno aŭ alia ne akceptos la kunlaboron?

#### Z N O J M O

La E-klubo komencis la kursojn de Esperanto por infanoj la 9-an de septembro kaj por plenkreskuloj la 15-an de septembro. Entute aligis 29 personoj kaj instruas s-ano V. Rotrekl. En la bazlernejo gvidas la kurson kun 16 infanoj s-ino J. Machovcová.

(Rotrekl)

Anoj de Přerova fundamenta organizo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio adiaŭis la 6-an de majo 1988 kun s-ano V L A D I M Í R V Y M Ě T A L

el Kojetín. Li estis unu el kreintoj de Esperanto-rondeto ĉe uzina klubo de Přerov-masinfabrika. Kiu konis lin, dedicu al li rememoron.

Ludvík Chytil

La 5-an de aŭgusto akompanis esperantistoj en Ostrava sian longjaran klubanon

s-anon E V Ž E N Š P A Ć E K

al tombo por esprimi al li la lastan honoron. Li mortis subite 86-jara kaj restis fidela al internacia lingvo ĝis fino de sia vivo. Kvietan rememoron al li. Janouš

Post longa kaj peza malsano mortis la 14-an de aŭgusto 1988 en malsanulejo en Prago en ago de 58 jaroj membro de ĈEA, de invalida sekcio kaj de Esperanto-rondeto en Kladno s-ino V L A S T A K Ř Í Ž O V Á .

La lasta adiaŭo kun ŝi okazis la 19-an de aŭgusto je la 11-a horo en la sepulta salono de la kladna tombejo.

Miloš Zelinka



Komence de la 70 jaroj oni taksis, ke en Sovet-unio troviĝas E-kluboĵoj au rondetoj en ĉirkaŭ 600 lokoj. La ruslingva Informa Bulteno de ASE (n-ro 10-11/48-49, 1984) publikigis la adresojn de 139 E-societoj oficiale agnoskitaj de ASE, kiu havas filiojn en Armenio, Estonio, Latvio, Litovio, Ukrainio kaj Uzbekio. En Leningrado ekzistas 7, en Moskvo kaj Vladivostoko po 2, en Rostov/Don 5, en Vilnius (Litovio), Riga (Latvio) kaj Tallin (Estonio) po 4 E-societoj. La ukraina, belorusa, uzbecka, kazaha, gruza, azerbajĝana, taĝika, armena kaj moldava respublikoj havas siajn proprajn klubojn. E-rondojn oni povas renkonti ankaŭ en foraj kaj izolitaj urboj kiel Sverdlovsk, Tjumen, Tobolsk, Surgut, Niĵnevartovsk, Ĉeljabinsk (ĉiuj en Uralo), Barnaul, Angarsk, Krasnojarsk, Novosibirsk, Tomsk, Magadan (Siberio), sur la kamatka duoninsulo (malproksima oriento), sed ankaŭ en la autonomaj respublikoj de la komioj, marioj, tataroj, baskiroj, abĥazoj kaj agaroj. Tiuj societoj, inter ili junularaj, kutime portas carmajn nomojn kiel "Espero", "Amikaro", "Norda Stelo", "Optimisto", "Kontakto", "Verda Velo", "Revo", "Verda Aŭroro", "Mateno", "Citadello", "Suneto", "Juneco" ktp. Tiuj societoj agadas kutime kadre de la urba centra biblioteko, universitato, kulturdomo, kulturpalaco, mezlernejo kaj aliaj institucioj.

En 1969 la registaro de Litovio decidis ebligi la instruadon de Esperanto en mezgradaĵ lernejoj kiel fakultativan objekton. Oficiala broŝuro de la edukministerio klarigis, ke Esperanto estas "la plej rapide lernaĵla el ĉiuj lingvoj de la mondo" kaj ke ĝi donas bonan bazon al la posta lernado de aliaj lingvoj. Similan favorigon spertas Latvio kaj Estonio. La ĉi-lastata famigis en Esperantio pro la apero de E-tradukoj el la estonlingva literaturo, historio kaj kulturo. La cebaltaĵ respublikoj do okupas apartan lokon en la E-movado de Sovetunio.

Sovetiaj E-periodaĵoj nomigas Paco, Tra Soveta Ukrainio, Soveta Uzbekistano, Horizonte de Soveta Litovio kaj Informbulteno de ASE (ruslingva). Ili ĉiuj mal-

ofte kaj malregule aperas. Krom tio, pluraj lokaj societoj eldonas siajn proprajn, tre modestajn kaj teknike malsukcesitajn informleterojn. La gazetara agentejo Novosti eldonas siajn politikajn broŝurojn ankaŭ en Esperanto. (A.E.Künzli)

## Litovio.

Pure junularaj E-kluboĵoj en Litovio jam estas ne nur en Vilnius kaj Kaunas, sed ankaŭ en Alytus kaj Ŝiauliai; kvankam la klubo "Dainava" en urbo Alytus aĝas jam pli ol duonjaron, ĝia oficiala fondigo okazis la 10-an de oktobro 1987; ankaŭ aŭtune fondiĝis junulara klubo "Kredo" en urbo Ŝiauliai, ĝia iniciatinto estas s-anino Lijana Vaitkeviciūtė - eksa membro de JEK "Ondo" en Kaunas, translokiĝinte al Ŝiauliai. Interalie, ĉiujare en Kaunas la klubo "Ondo" organizas Renkontigon de Esperantistaj Junularaj Kluboĵoj kaj Sekcioj, en 1987 ĝin partoprenis reprezentantoj de 8 kluboĵoj de Litovio, Latvio kaj Estonio.

## Novosibirsk.

OSER-43 okazis en majo 1987 en la siberia urbo Novosibirsk. Enkadre de tiu arango la reprezentantoj de siberiaj E-kluboĵoj atentigis, ke la informado pri siberiaj E-kluboĵoj estas ege malkontentiga. Sekve al tio oni decidis lanĉi informilon, kiun prizorgas Tomska E-Klubo. Ĉiu siberia E-klubo kunlaborema devas elekti el siaj vicoj redakcianon.

## Sverdlovsk.

En februaro 1983 okazis Literatura Semajnfino kun la programeroj: kontribuo de Sovetunio al la E-literaturo; kulturaj periodaĵoj en Esperanto; legantara konferenco de "Hungara Vivo".

## Tomsk.

En aprilo 1987 la tomska klubo "Amikeco" solenis la centjarigon de Esperanto. En la programo okazis: E-lingva spektaklo "La rusa salo", gazetara konferenco, diskuto pri perspektivoj de Esperanto en la dua jarcento.

En majo 1988, OSER-44, la grava renkontigo de la siberiaj esperantistoj okazis en Tomsk. Programeroj: seminario pri publicistiko, konkurso de publicistikaj E-artikoloj, konferenco de E-kluboĵoj.

## Urala Montaro.

Uralo estas suffice granda regiono en Sovetunio, kiu fakte estas la limo inter Eŭropo kaj Azio. Esperanto trafis Uralon ankoraŭ pasintjarcente. Nova epoko de E-aktiveco komenciĝis fine de la 60-aj jaroj. La unua E-klubo aperis en la urbo Ufa. Multon por disvolvigi la internacian lingvon tiame faris d-ro Boris Kolker, kiu sukcesis varbi por la E-movado multajn agemajn gejunulojn. En 1975 aperis E-klubo en la urbo Perm, iom poste en Sverdlovsk, kie poste iom estigis la kerno de urala E-vivo. Fine de 1986 en Uralo funkciis 18 E-kolektivoj (14 kluboj kaj 4 rondetoj). Ĉiu urala esperantisto laŭ sia gusto povas elekti plurajn E-aranĝojn dumjare. Por noviceco oni organizas "Komencanton" fare de Sverdlovskaja E-Klubo, "Gajan Erinakon" fare de la permanoj k.a. Antaŭpasintjare en oktobro en Sverdlovsk okazis jam la 11-a UER (Urala E-Renkontigo). Ĉiu UER havas iun ĉeftemon, kiun oni tre atente pritraktas. La pasinta ĉeftemo de UER estis "Kluba agado". Tre popularas inter la urala e-istaro la jam tradicia Urala Konferenco pri Planlingvoj, kiu en 1987 okazis la kvinan fojon aŭspicie de la Perma Ŝtata Universitato. Abundas diversstipaj Esperantaj kulturaj aranĝoj. La plej populara inter ili sendube estas la "Dekado de Esperanto", kiu en 1987 la kvinan fojon okazis en Sverdlovsk. La dekado dediĉiĝis al la 100-jara jubileo de Esperanto. La programo diversas: jubilea konferenco, lekcioj, traduka rondo, vesperaj aranĝoj, seminarioj, pikniko, aŭkcio, ekskursoj, rendevuoj kun famaj neesperantistaj verkistoj ktp. Tre precize la urala E-informilo "Ekzakte" katene kunigas ĉiujn uralajn E-klubojn. Poiome montriĝas populareco de la literatura almanako "Sazonoj", kie surpage renkontiĝas ankaŭ aliregionaj esperantistoj.

## Ĉukotkio.

La plej nord-orientaj e-istoj en Sovetunio kaj en tuta Azio tre volonte interkorespondus kun la tuta esperantistaro. Sur la ĉukotka duoninsulo dum 1929/30 vivis la fama Vasilij Eroŝenko, blinda rusa esperantisto, kiu samtempe estis klasikulo de la japana literaturo. Pri tio oni povas legi en du biografiaj libroj pri Eroŝenko: ukrainlingva "Ek-

bruligis mi en koro la ardon" de Nadija Andrianova (ukraina E-verkistino) kaj ruslingva "La homo, kiu vidis la mondon" de Aleksandr Harkovskij. La estraro de Ĉukotka E-Ligo decidis fari en almenaŭ du muzeoj de Ĉukotka Nacia Autonomia Distrikto ekspoziciojn pri Eroŝenko, kiu samtempe estis pacmondano. Unu muzeo en la ĉefurbo de Ĉukotkio, Anadyr, estas ŝtata, la alia en la urbetoj Egvekinot estas socia posedaĵo. ĈEL petas do materialojn pri Eroŝenko por estonta muzea ekspozicio. ĈEL intencas kompili kaj eldoni Jarlibron de la E-movado en USSR, en la rusa lingvo. Jen la adreso de ĈEL: P. O. Box 22, SU-686810 Egvekinot, Magadan-provincio.

## Uzbekio.

La redakcio de la ruslingva gazeto "Soveta Uzbekio" konsentis havigi al la uzbekaj e-istoj Esperantan rubrikon. Al ili disponigatas duonpago en ĉiu numero. En la rubriko aperados en Esperanto kurantaj informoj pri la nuntempa kaj antikva Uzbekio, respondoj al la leteroj, ronda tablo, literaturaĵoj ktp. La unua E-rubriko aperis en aprilo 1988, la unua leciono de Esperanto en junio. Amase skribu al: Sovetskij Uzbekistan, ul. Lenina 41, SU-700000 Taŝkent.

(La tuta teksto estas el "TEJO-Tutmondo n-ro 2/1988.)

La revuo "Soveta Uzbekio" aperas en dek du lingvoj kaj en la kadro de la E-rubriko ĝi aperigas malgrandan kurson de Esperanto. Sekve la kurso aperas en la uzbeka, araba, rusa, persa, daria, angla, franca, germana, hispana k.a. lingvoj. Skribu amase al la revuo, skribu kion vi scias kaj pensas pri Uzbekio, ĝia evoluo, ĝia rolo en la granda popolfamilio. Viaj kontribuoj estas tre bonvenaj. Pro numero de la revuo sendas la Esperanto-Komisiono, a/k 140, SU-700000 Poŝtamt-Taŝkent kontraŭ sumeto, kiun oni sendu al UEA.

La tutlanda junulara ĵurnalo Komsomolskaja pravda levis la demandon de la Stalinaj persekutoj kontraŭ Esperanto sur sia frontpago 20.8.1988. Temas pri tio, ke de strato en la urbo Kazanĵ (Tatara AR) oni forprenis la nomon de la Stalina kulturministro Ĵdanov kaj redonis la originan nomon - "Esperanto".

(Esperanto 10/1988)

## 2-a Internacia Sovetia Esperantista Junulara Tendaro - InterSEJT-89

Ekde 29 marto ĝis 05 aprilo 1989 ASE kaj ĝia Junulara Komisiono surbaze de Minskaj E-kluboj organizas 2-an Internacian Sovetian Esperantistan Junularan Tendaron - InterSEJT-89 en turista centro "Juneco" de buroo "Sputnik" en Minsk, ĉefurbo de Belorusio.

Ni invitas esperantistojn de diversaj landoj partopreni ĉi arangon. Ili anticipe kontaktu reprezentantojn de "Sputnik" en sia lando kaj pagu al ĝi la restadkostojn (loĝado kaj mangado) laŭ indikota de "Sputnik" prezo. La organizkotizon oni pagu en Minsk ĉe alveno al la organiza komitato en sumo egala al dutaga restado en "Juneco".

La dezirantojn partopreni tendaron ni petas anticipe sin anonci ĉe landaj E-A-socioj por veturi grupe, aŭ al ni kaze de foresto de grupo el koncerna lando tiel, ke ni sciu per kia preleĝo (pri ajna temo) aŭ koncerto la gastoj povas kontribui al Junulara Komisiono de ASE-Estraro kaj Organiza komitato de InterSEJT-89 ASE, Soveta Unio, 103885, Moskvo, K-9 prosp. Kalinina, 14

## Jarmeza Esperanto-Semajnfino

La Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR vin invitas partopreni en nova internacia esperantista arango, kiu nomigas "JARMEZA ESPERANTISTA SEMAJNFINO" (JES) kaj okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989 en la urbeto Markkleeberg, kiu estas kvazaŭ urboparto de Leipzig. La arangon oni okazigos en kunlaboro kun la Agrikultura Ekspozicio de GDR kaj ĝia ĉeftemo estos PANON POR ĈIUJ HAVAS LA TERO.

La "JES" ne nur turnigas al ekspertoj pri agrikulturo, sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj intencas uzi la Internacian Lingvon kiel interkomprenilon. Tamen: interesigantoj pri naturprotektado, forstado, naturo en tre vasta senco, bestobredado, etgardenado kaj similaj temoj havos la okazon pliprofundigi tiurilatajn konojn. Oni perigis senkoston ampleksan bultenon, kiu enhavas ĉiujn detalojn de la JES-arango. Antaŭmendu ĝin ĉe: KULTURBUND DER DDR, Esperanto-Asocio, Käthe-Kollwitz-Strasse 115, Leipzig, DDR-7010.

## Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU)

ĉe la universitato "Kiril kaj Metodij" en Veliko Tarnovo, Bulgario, okazos de la 15-a de julio ĝis la 20-a de julio 1989.

Preleĝos eminentaj bulgaraj kaj alilandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj. Aligkoto por eksterlandanoj - 90 levoĝ, pagataj surloke. Ĝi inkluzivas tranoktadon, mangadon, interkonan vesperon, ekskursojn kaj aliajn arangojn. Organizanto de 11-persona grupo ricevas kiel deknua 100 % rabaton, t.e. li partoprenos senpage en la sesio. Lmdato - 15.06.1989. Bonvolu peti programon kaj aligilon de

Esperantista societo "Lumo"


P. K. 121

5 000 Veliko Tarnovo, Bulgario

## Mondkongreso de Monda Asocio pri Psikiatrio de infanaĝo kaj pri Koncernaj sciencoj

En la itallingva svisa urbo Lugano okazos, 20-24.09.1989, la kvara mondkongreso pri psikiatrio de la unua infanaĝo kaj pri Koncernaj sciencoj. La mondkongreson organizas loka grupo de Monda Asocio pri Psikiatrio de Unua Infanaĝo kaj pri Koncernaj Sciencoj. La Mondkongreso estos dediĉata al "Novaj Orientigoj pri la Unua Infanaĝo". Aparte, oni antaŭvidas jenajn temarojn: "Novaj orientigoj en psikobiologio", "Novaj orientigoj en kliniko", "Kulturaj variaĵoj kaj infana disvolvigo", "Novaj orientigoj en preventivo kaj en terapio", "Novaj orientigoj en la studo de netipaj evoluoj". La oficialaj lingvoj estos la angla, la franca kaj la itala, tamen se kelkaj E-parolantoj specialistoj partoprenos, eblos organizi ion specialan por ili. Informilon en angla-franca-itala petu de: D-ro Tazio Carlevaro, Via A. Di Sacco 6, CH-6500 Bellinzona, Svislando.





# KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

Viaĝem ĉasopisy a knihy. Prevádzam túto prácu lacno medzi 28-30,- Kčs za ročník alebo knihu. Esperantisti, ktorí obyčajne odoberajú mnoho časopisov, môžu využiť moje služby. Povolenie mám č.j.

ME/4021/87/2a z 5.4.1988.

Stanislav Bartovic, Vážska 3560,  
921 01 Piešťany.

Prodám:

1/ Plena Vortaro de Esperanto kun suplemento. Prof. E. Grosjean-Maupin  
Paříž 1964, str. 564

2/ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto  
Kunlaborantoj. Paříž 1970, str. 1300.

Nabídněte nebo vyměním za čisté čl. známky "Pošta československá 1919", SO, nebo téma: kůň a tanec z celého světa pokud je nemám. Dr. Zdeněk Krupka, Politic. věžňů 53, 280 02 Kolín 4, tel. 203 64.

Mi deziras intersangi bildkartojn pri folkloraj kostumoj kaj pri cefurboj de landoj. Ĉiam mi respondos. Adreso: Vladimír Rotrekl, Dobšice 297, 669 02 Znojmo, Ĉeĥoslovakio.

Deziras korespondi pri diversaj temoj kaj intersangas neuzitajn postmarkojn - tutajn seriojn de temoj: flauro, fauno, sporto, kosmo, popolaj kostumoj - specialajn unuataĝajn kovertojn kun postmarkoj kaj stampoj, neuzitajn ilustritajn postkartojn, neuzitajn ilustritajn kovertojn kun postmarkoj, kolorajn bildkartojn, monerojn, alometiketojn, kalendaretojn. Adreso: Bulgario 5500 Lovec, str. Kiril i Metodi 42, Koljo Petrov Kančov.

14-jarolino volas korespondi kun knaboj ĝis 16-jaroj el Ĉeĥoslovakio. Ŝi intersigas pri muziko, danco kaj turismo. N.R. Bulgaria, Kazanlak, bul. M. Tolbuhin N<sup>o</sup> 3, vt. 6, ap. 13, Radina Atanasova Dimitrova.

Pensiulino-flegistino, kiu havas multajn kulturaĵajn interesojn, sed same manlaborojn - ŝi brodas gobelinbildojn kaj tri-

kas multe, volas korespondi. Adreso: Bulgario, 7006 Rousse, "Rodina - 2" bl. "Balgarka" vh 2 PK 3, Stefka P. Paneva.

Ĉina esperantisto volus korespondi kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Klarigu nomon, adreson, landon kaj enhavon. Uzu nigran inkon kaj ne uzu aliajn kolorojn. La plej bona estas skribmasino. Adreso: Wang Yixiang, Dangtu nr. 066, 243100 Anhui, Ĉinio.

15-jara hungara lernantino volus korespondi kun ĉeĥa lernantino aŭ lernanto. Adreso: Szüts Éva, Jászberény, Tóborzó u. 27, 5100 Hungario.

17-jara polo interesigas pri turismo kaj futbalo: Andree Wilczyk, ul. Wiejska 6/78 15-352 Białystok, Pollando.

32-jara laboristo interesigas pri turismo, sporto kaj folkloro, kolektas postmarkojn, bildkartojn kaj longludantajn sondiskojn: Ryszard Kwiatkowski, PL-14-528 Lipowina 9/12, woj. Elbląg, Pollando.

17-jara polo interesigas pri Esperanto, komputeroj kaj moderna elektroniko, en liberaj momentoj li volonte auskultas elektronikan muzikon kaj kantojn de Michael Jackson, li ankaŭ satas sciencfikciajn literaturon. Adreso: Tomasz Kowalczyk, ul. SF. Mazur 3/45, 32-510 Jaworzno, Pollando.

26-jara studentino interesigas pri turismo kaj literaturo: Elzbieta Stempnik, 74-400 Dębno, str. Buczka 1/11, Pollando.

21-jarulo interesigas pri turismo, geografio kaj fremdaj lingvoj, kolektas bildkartojn: Adam Kowalski, ul. H. Sawickiej 5/6, 67-400 Wschowa, Pollando.

39-jara instruistino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro: Ludovika Małecka, str. Wodna 49, 44-200 Rybnik, Pollando.

# el la sekretariejo

## FESTOJ OMAGE AL LA 20-a DATREVENO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

La festoj okazos en Havířov ekde la 25-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1989 kaj havos rican kulturalan programon:

- 1) la inauguran solenan kunvenon kun paroladoj kaj salutoj de eksterlandaj delegitoj
- 2) teatron prezentadon - oni invitos teatron el Bialistoko aŭ alian trupon el Pollando aŭ el alia lando,
- 3) filman posttagmezon - estos projekciataj esperantlingve parolantaj filmoj,
- 4) koncerton de la ĉeĥoslovakaj Esperanto-artistoj (kantos M. Smyčka, J. Vich, la ensemblo el Štěbořice, deklamos E. Seemaznová),
- 5) prezentigon de Barbuloj kaj eble de aliaj Esperantaj trupoj,
- 6) interkonan vesperon kun dancado - ludos kapelo de Havířov,
- 7) kunvenojn de unuopaj sekcioj kaj precipe prelegojn de la literatura sekcio kun artisma literatura programo.

La partoprenkotizo (sen logado kaj manĝado) kostas 250,- Kčs. Aligilojn (nomon, adreson, naskigdaton, legitimil-numeron, datojn de tranoktoj, specon de hotelo aŭ tranoktejo) sendu al la sekretariejo de ĈEA (Jilská 10, Praha 1). De tie vi ricevos ankaŭ postpaŝilon por ĉiuj necesaj pagoj.

La sekretariejo de ĈEA plibonigis siajn servojn por esperantistoj. La vendotempo de esperantaĵoj estas nun jena:

de lundo ĝis vendredo de la 9-a ĝis la 17-a horo,  
sabate (ĉiun 1-an kaj 3-an sabaton en monato) de la 9-a ĝis la 13-a horo.

Vendeblaj estas diversspecaj vidaĵkartoj kun E-lingva teksto,  
medalo omage al la centjarigo de Esperanto kun portreto de L.L.Zamenhof,  
verko de akademia skulptisto J. Harcuba Kčs 130,-  
sondisko de country-grupo Barbuloj (4 kantoj en Esperanto) Kčs 16,-  
Ĉiam malnova (libro pri Prago) Kčs 19,-  
Meze de Europo (konciza historio de Ĉeĥoslovakio) Kčs 15,-

Atenton! La redakcio de Starto urĝe bezonas reprodukteblajn foto-portretojn (vizaĝojn) de jenaj honoraj membroj de ĈEA: D-ro Fousek, prof. Kilian, prof. Lukáš, Fr. Pyloun, prof. V. Scheiber, Ĝustr, Odehnal, Vítek, Fr. Staněk. Kiu povas helpi al ni? La fotojn ni bonorde redonos.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika arango), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Presas OKP-6 LIBEREC. Transdonita al presejo 1988-11-30. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkosto. Abonantoj turnu sin al niaj partoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravideblaj vĉestnik ĉeskeho esperantskeho svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potrebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafická úprava), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (odpovědný redaktor) a Helena ŠTRUNCOVÁ. Povoleno odborem kultury NVP č. 31000385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne OKP-6 LIBEREC. Předáno do tisku 30. 11. 1988. Dohlédací pošta Praha 07. Snižený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

## KAZETY VÝPUJČNÍ MAGNETOFONOVÉ SLUŽBY ČES

- TRA LA MONDO /kantas Olivier Tzaut, Svislando/  
 B. Karnavaleto, Piron - La kampulo, Brassens - La mazurko, franca popola - Atentu ĝis venos luno, meksika popola - La diamantministo, Piron - La rajdanto, meksika popola - Ĉu malĝoja, cigana rusa - Mi vin amas, haitia popola - La lekantetoj, juda popola 30'
- BULGARAJ KAJ JUGOSLAVAJ KANTOJ  
 A. Kantas Mišo Zdravev, Bulgario: Bonan nokton, Steletoj, Mia Kubo, Ludvika Aleksandra, Servu ni, Revenu vi, Ĉojo, Ropotamo, Mia eta ĉim, Venu en Borovec, Juna senjorita (kant. Diego Varagiĉ, Jugoslavio) 30'  
 B. Forlasos mi la panjon /D. Varagiĉ/, Mi ŝtelos viajn rozajn /D. Varagiĉ/, Revo /Koruso "Esperanto", Bulgario/, Ĉaskorno /"Esperanto"/, Turistoj /"Esperanto"/, Ĉiun scieron /kant. M. Nikolova, Bulgario/, La amo de la junmaristo /kant. K. Semov, Bulg./, Adiaŭo de la maristo /K. Semov/, Ripetis vi ĝin, etulino /D. Varagiĉ/, Lumeto /Tallat-Kelpŝajté, Litovio/ 30'
- + ĈU VI PAROLAS ESPERANTE?  
 Kurso por komencantoj kaj por progresintoj de Andrzej Pettyn, Poll. 105'  
 Kvar kantoj de Mišo Zdravev: Bonan nokton, Steletoj, Mia Kubo, Ludvika Aleksandra 15'  
 Atentu! Dukazeta kompleto!
- ESPERANTO LAŬ SKRIBAJ KURSOJ  
 /parolas E. Seemannová + V. Vinař/. Kazeta je určena začátečníkům, kteří studují písemný kurs organizovaný ČES. Je možno také nahranou kazetu koupit v sekretariátu CES, Jilská 10, 110 01 Praha 1 60'
- Vlast. Novobilský: JAN AMOS KOMENSKÝ  
 /parolas Věra Novobilská, Miroslav Smyčka kaj Vl. Novobilský/  
 Tri kantojn kantas Marcela Fasani, Italio: Novembro 72-a, La paliso, Maurisi 50'  
 10'
- Eli Urbanová: VERSO KAJ LARMO  
 /recitas Eva Seemannová, teknike kunlaboras M. Smyčka/ 90'
- A: KANTAS JAK + ARMEL LEPUILL (Francio)  
 Danc-kanzono, Homa vivo, Vilagano, Prizonoj, Tion neniam vidis mi, La dizertonto, Parasutisto, Danĝera ulo 30'  
 B: POLA KANTISTO ANDRZEJ TOMECKI  
 /kelkaj kantoj de la pola kantisto/  
 Tri kantoj de Tallat-Kelpŝajté, Litovio: Lumeto, Sunaj veloj, Turoj 20'  
 10'
- A: LETEROJ /kantas Jak Lepuill, Francio/  
 Kion vi lernis en lernejo, Botelo de vino,  
 /kantas Olivier Tzaut, Svislando/ Tamburisto, Buklo, buklo,  
 Dekses tunoj, Ni perdis Liberecon, Matenkanto  
 /kantas F. Jagher, Usono, kaj akompanas sin per gitaro/ La lingvo por ni  
 B: ZELENÁ HVĚZDIČKA /rozhlasový pořad o ostravských esperantistech/  
 /kantas F. Jagher/ Bovoĉaro, Jukajdi, jukajda, Lorelaj 60'

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dodací pošta Praha 07**

**Splacený poštovní poplatek povolen**

**Keu. telstvím pošt Praha**

**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**